

Eldonantaro:

D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, adv., Edinburg
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, Barcelona
H. Fischer, grandindustriisto, București (Rum.)
Teo Jung, Köln (Kolonia)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

Administrejo:

Horrem bei Köln, Germ.
Poŝteĉkonto Köln 70863, por Teo Jung, Horrem.

Redakcio:

Ĉefredaktoro: Teo Jung.
Literatura red.: Zanoni.

ESPERANTO

★ TRIUMFONTO ★

Aperas semajne, kun monataj aldonoj „Revuo“ kaj „Internacia Komercio“

Abonon ni akceptas ne por fiksita tempo (jaro, monato) sed por nombro de ET-numeroj. Oni sendu iun sumon, kaj ni liveros ET ĝis elĉerpiĝo de la sumo. Pri finiĝonta abono ni informas. Oni pagu ne per poŝtmandato, sed per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero. „Revuo“ kaj „Internacia Komercio“ senpage por ET-abonantoj.

Prezo de unu numero por la landoj kun kolonioj:
Argent. 0.15 Peso Ĉeĥosl. 1.20 Kr. Germana 600 Mk. Kanada 0.06 Dol. Portug. 0.60 Esk.
Aŭstra 1500 Kr. Estono — (Abonu nur ĉe Latva — Rumana 4 Leoj
Belga 0.65 Fk. Finna 1.20 Fmk. poŝt-ŝecelo) Litova 30 Cd. Rusa 200 Gmk.
Brazilo 0.400 Mr. Franca 0.60 Fk. Italio 0.80 Lit. Nederl. 0.15 Hfl. Sveda 0.24 Kr.
Brita 3/4 Pc. Hispana 0.30 Pes. Japano 0.10 Jen. Norvego 0.30 Kr. Svisla 0.30 Fk.
Bulgara 4 Levoj Hungara 60 Kr. Jugosl. 2.50 Din. Pola 800 Mk. U. S. A. 0.06 Dol.

Nenomiĝitaj landoj pagu provizore egalvaloron de 0.20 sv. fk. aŭ 0.04 Dol.

Por Adressaĝoj ni kalkulas du numerojn de la abonkonto.
Dumviva Abono kostas la prezon de 400 numeroj. Anoncoj kostas po cm² 0.10 svisan frankon (aŭ ĉe antaŭpago 200 gmk.); rabato laŭ interkonsento. Por „Internacia Komercio“ kaj specialaj numeroj speciala prezo.

Atentu la specialan aldonon

pri la gazetara demando kaj la aktualigo de ET

aldonitan al la hodiaŭa numero!


N-o 129 :-: Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 25. III. 23.

Esperanto



La unua en Latvujo Esperanta Ĥoro.

de Riga Fcncolgia Muzike-Pedagoga Instituto (la instituto aliĝis al UEA), kiu antaŭ nelonge aŭdigis la novajn Esp. kompoziciojn de muz. prof. Ernesto Wiegner, fondinto kaj direktoro de l' Instituto (la profesoro sidas en la mezo). Prof. Wiegner, kiu nunjare somere dum la Tuilaŭvaj Kentolagoj festas sian jubileon de ducentjara muzikpedagogia agado, transiras de unu ovacio al alia. Ankoraŭ 2-3 societoj en Riga petas Esperantajn muziknotojn por ĥorkanto.



La Komitato de Riga Esperanta Societo.

Sidas (de maldekstre): Inte Ĉaĉe, kasisto kaj instruisto de Esp. blinduloj; Tallvaldo Indra, prezidanto kaj gvidanto de superal Esp. kursoj, vegetarano; profesorezino Kadik; Petro Kadik (Kadikis), mat. prof. ĉe Latvua Universitato, fondinto de stud. korporacio „Leitonia“, elpensinto de kalkul-aparato, ĉefo de Administrejo por mezur- kaj pesiloj, la plej malnova en Latvujo Esperantisto (de pli ol 80 jaroj), honora membro de Riga Esp. Societo; A. Kraŭze, bibliotekisto
Staras (de maldekstre): Leifskalna; Zjedonis Indra; Edgardo Grot, ĉefsekretario de Soc., ano de budhista ordeno „Sangha“, vegetarano; K. Kacens, vicprezidanto; Ĵurevskij.

en Latvujo.



La unua en Latvujo Komedia Esperanta Trupo.

La fina sceno de komedieto „Konvenajoj“.

(De maldekstre): f-ino M. Dzelzite; a-o T. Indra; f-ino Lizete Berzin; a-ino K. Indra; a-o I. Ĉaĉe.

Esperanto en Brazilio.

En la kunsido de la V-a Komisiono de la Ligo de Nacioj pri Esperanto, la 13-an de septembro 1922, la delegito de Brazilio, s-o Rio Branco, diris interalie: „La Ligo de Nacioj neniam donu sian helpon al movado, kiu estas danĝera por la lingvoj kaj kulturoj naciaj. La brazila delegacio nepre estas kontraŭulo al Esperanto, kiu ne povas prezenti iun valoron laŭ intelekta vidpunkto. Ĝi opinias, ke la ideo de enkonduko de Internacia lingvo estas utopio, eĉ danĝera utopio.“ (Vidu ET 103.)

Tiu diro de la brazila delegito kontrastas strange kun la apogo, kiun Esperanto havas pli kaj pli, precipe ĉe la oficialaj rondoj, en Brazilio.

Ni memorigu pri la subvencio de 1500 milreĵoj, kiun voĉdonis la brazila parlamento al Brazilia Esp. Ligo (komparu ET 105), pri la decido de la parlamento de 4. dec. (ET 122), nun sendita al la Senato, pri la permeso de la ministro de l' publikaj laboroj, ke la Organiza Komitato por la 7-a Brazilia Kongreso de Esperanto (ĵus okazinta la 9-14. marto en Rio de Janeiro) telegrafu senpage ĉien en Brazilio, pri la akcepto de du ministroj esti honoraj prezidantoj de tiu ĉi kongreso (ET 125), plue pri la favora opinio, kiun Esperanto ĝuas en komercaj kaj ekonomiaj rondoj (la komitato de la Ekspozicio okaze de la Centjara Sendependeco eĉ mendis kaj pagis specialan numeron de ET; n-on 86), plue ĉe inĝenieroj (komp. ET 108; — dum la kunsido de la Direktanta Konsilantaro de la Klubo de Inĝenieroj okazinta la 20. nov. oni elektis komitaton por prepari teknikan vortaron pri inĝenierarto en Esperanto), ktp.

Pro ĝia graveco ni refoje publikigas ĉi-sekvante la decidon de la parlamento, laŭ la ĵus ricevita decembra numero de „Brazilia Esperantisto“.

D-ro José Augusto, unua sekretario de la Deputitaro Ĉambro, prezentis la 4-an de decembro, la jenan projekton:

„La Nacia Parlamento decidas:

Art. 1. Ĉiulare, en la Kolegio Petro II-a kaj en ĉiuj instrueroj, kie okazos ekzamenoj de preparaj studoj, estos ankaŭ ekzameno de la helpa internacia lingvo Esperanto, kiu obeos al la samaj formalajoj de la ceteraj ekzamenoj de vivantaj lingvoj.

Art. 2. La atesto de ekzameno de Esperanto egalvaloros, por la matrikulo en la superaj kursoj de la Respubliko, al tiuj akiritaj de la lernantoj, kiuj preferas fari ekzamenon de la germana lingvo.“

Tiu projekto estas sendita al la Instruada Komitato, kiu en sia unua kunsido aprobis la bonegan raporton de D-ro Tavares Cavalcanti tute favoran al la projekto.

Submetita al tri diskutadoj, la projekto estas fine aprobita la 28-an de decembro kaj sendita al la Senato.

Dum la dua diskutado faris bonegan paroladon deputito Augusto de Lima, membro de la Brazilia Literatura Akademio.

Estas notinde, ke la projekto estas unuanime aprobita en ĉiuj diskutadoj.

En la brazilaj ĵurnaloj aperis du aŭ tri artikoloj kontraŭ la projekto kaj multaj favoraj. El tiuj ĉi ni citas tiujn de Medeiros e Albuquerque, fama ĵurnalistoj kaj eksdeputito, kaj de deputito Gonçalves Maia.

En la sama numero de „Brazilia Esperantisto“ ni trovas ankoraŭ jenajn dokumentojn pri Esperanto en la komercio:

La I-a Kongreso de la Brazilaj Komercaj Asocioj okazinta en Rio de Janeiro aprobis unuanime la jenan rezolucion prezentitan de s-oj F. Bulcão, Victorino Monteiro, D-ro Heitor Beltrão, inĝenieroj Arruda Beltrão kaj Couto Fernandes:

„La Kongreso de la Brazilaj Komercaj Asocioj decidis konsili la instruado de Esperanto en la komercaj lernejoj kaj la uzadon de tiu helpa lingvo en la rilatoj kun la eksterlandaj komercaj ĉambroj.“

La II-a Amerika Kongreso de Ekonomia Disvastigo kaj Komerca Instruado ankaŭ okazinta en Rio de Janeiro unuanime aprobis, laŭ propono de s-oj D-roj Raul Campos, Miranda Jordão kaj Augusto Ramos, la jenan rezolucion:

La Dua Amerika Kongreso de Ekonomia Disvastigo kaj Komerca Instruado montras la neceson enmeti en la programojn de la komerca instruado de ĉiu amerika lando la lingvon Esperanto por faciligi la komercajn rilatojn.“

Jen, kiel marŝas nia afero en Brazilio, spite la asertojn de s-o Rio Branco, kiu ŝajne tute ne estis informita pri la stato de Esperanto en sia lando. Niaj brazilaj samideanoj fosos sian sulkon. Gratulon al ili pro la atingitaj sukcesoj kaj freŝan kuraĝon por sekvantaj!

Akademio.

Cirkulero de la Prezidanto al la L. K.-anoj.
(Fino.)

II. Propono de la Akademio.

Laŭ la Regularo ĉirkaŭe 50 L. K.-anoj (novaj kaj malnovaj) estas submetotaj al elekto aŭ reelekto. Tia amasa elektado ne estas bona, sed kulpa estas la milito. Ni tamen ne rajtas agi alimaniere tiun ĉi jaron. Sed, por ke tio ne okazu ree post 9 jaroj, la Akademio proponas, ke la unua triono de la de vi elektitaj (pli da voĉoj) estos elektita por 9 jaroj: la dua triono (malpli da voĉoj) por 8 jaroj kaj la tria triono (ankaŭ malpli da voĉoj) por 7 jaroj. Dank' al tio ni ne havas „truojn“ kaj ĉiulare ni havos ĉirkaŭe 12 ĝis 14 L. K.-anojn por elekti aŭ reelekti. — Pro sama motivo ankaŭ, ĝi proponas, ke oni plilongigu de unu jaro la mandaton de la duono (montrita de l' sortio) de la 22 L. K.-anoj ellontaj en 1928. Tiamaniere ni evitos truon en 1929. — Sekve de tiuj diversaj aranĝoj ni havos tute regule ĉiulare ne tro multnombbran, klaran, pli facilan balotadon — kaj tio estos pli bona, ol subita, amasa elektado de multnombraj kandidatoj, kies titolojn oni malfacile povas serioze ekzameni. La Akademio estas konviktita, ke nur tiel ni povos eliri el naoso, nuna kaj estonta, konsekvenco de la multjara Mondmilito. — Ĉu vi aprobas?

III. Kandidatoj (lingva komitato).

(La tiun ĉi jaron ne rebalototaj L. K.-anoj estas por angla lingvo 7, bulgara 1, ĉeĥa 1, franca 10, germana 9, hebrea 1 (erare s-o Muĉnik estis rigardata kiel eksiginta: lin ne atingis la leteroj en Palestino), hispana 3, holanda 2, hungara 2, itala 4, kataluna 2, litova 1, rumana 1, rusa 4 (?) sveda 2. — Por la rusa lingvo la Akad. prezentas nur s-on Medem, anst. s-o Dombrowski, kiu de nun reprezentas la litovan lingvon. Ceterajn rusojn la Ak. proponos post la Kongreso, nun neeble. S-oj Wackrill kaj Inglada eliras tiun ĉi jaron samtempe el la Akad. kaj el la L. K. III, kiel ĉiuj L. K.-anoj estas reelekteblaj.)

Konforme al § 6 de nia Regularo la Akad. proponas, krom la elirantaj reelekteblaj L. K.-anoj, novajn kandidatojn.

Jen la alfabeto listo.

(Pro manko de loko ni ne povas publikigi la detalojn de la listo: lingvoj sciataj, Esp. titoloj, Esp. laboroj de la kandidato, vidpunkto de l' kandidato koncerne fidelecon al la Fundamento kaj disciplinon, kvankam tiuj detaloj donus iom fidindan mezurilon por la kapableco de la kandidatoj.)

Bailey (W.), muzikisto, Manchester (Anglujo), Anglo.
Belmont (Leo), advokato, instruisto, Varsovio (Polujo), Polo.
Blicher (M. H.), kand. fil., Kopenhago (Danujo), Dano.
Butin (Max), komercisto, Godesberg (Germ.), Germano.
Collinson (W. E.), profesoro de germana lingvo ĉe la Universitato de Liverpool, Liverpool (Anglujo), Anglo.
Czubinski (D-ro A.), Varsovio (Polujo), Polo.
Dietterle (J.), profesoro, Sup. Stud. Konsilanto. Lelpzig (Germ.), Germano.
Diez (F.), prof. ĉe Kom. Universitato, Bilbao (Hispano), Hispano.
Dreher (L.=Leo Turno), gimn. instruisto, Bialystok (Pol.), Hebreo.
Edmonds (Ch. E.), helpanto al Reguligisto de Avecio, Welwyn Garden City (Anglujo), Anglo.
Fujisawa (C.), prof. de historio ĉe la Universitato de Kiŭŝu (Japanujo), Genève (Svisujo), Japano.
Giesswein (Al.), kanoniko, Budapeŝt (Hung.), Hungaro.
Harvey (W.), l. S. O. Eks-ŝtata oficisto, Edinburgh, Skoto.
Hromada (R.), bankoficisto, Praha (Ĉeĥosl.) Ĉeĥo.
Isbrücker (J. R. G.), inĝeniero, s-Gravenhage (Nederlandoj), Nederlandano.
Kalocsay (D-ro K. de), kuracisto, Budapeŝt (Hungarujo), Hungaro.
Kenn (Won), studento, Lyon (Francujo), Ĥino.
Leizerowicz (I. Ilo), estro de filmagentejo, Lodz (Pol.), Hebreo.
Lippmann (W. J.), juristo, Lelpzig (Germanujo), Germano.
Lonkopolanski (E. Wiesenfeld), dentkuracisto, Varsovio (Pol.), Polo.
Loy (K.), distrikta vicprefekto, Kronach (Germ.), Germano.
Lutteroth (A.), juristo (D-ro u. i.), Breslau (Germanujo), Germano.
Mangada-Rosenörn (J.), majoro, Jaca (Hispanujo), Hispano.
Medem (P.), bank- kaj fabrikdirektoro, eks-artileria kol. leŭt., Kaunas (Litovujo), Litovano.

Unua devo de ĉiu serioza Esperantisto estas aboni ET kaj aliĝi al Universala Esperanto Asocio.

Migliorini (B.), D-ro filolog., lektoro ĉe la Roma Univ., Roma (Italujo), **Italo**.
Minor (K.), kuracisto, Hamburg (Germanujo.), Germano.
Mojado (M.), katol. pastro, Madrid (Hispanujo), Hispano.
Pittik (A.), Sup. Komisaro de la ĉsl. komerc-ministerio. Praha (Ĉsl.), Ĉeĥo.
Racz (B. de Kövesd), juĝisto, Budapest (Hung.), Hungaro.
Selälä (V. S.), kand. flil., Helsinki (Finl.), Finno.
Sinpak (An), studento, Lyon (Francujo), Flino.
Solá (M.), farmacistino, Barcelona (Hispanujo), Kataluno.
Supichová (f-lino J.), instruistino, Praha (Ĉsl.), Ĉeĥino.
Stamatiadis (D-ro An.), kuracisto, Konstantinopolo (Turk.), Greko.
Vaona (Art.), advokato, Verona (Italujo), Italo.

Kelkaj kandidatoj, prezentitaj de Naclaj aŭ Fakaj Societoj, malgraŭ nedubaj meritoj (elekti ni ja devis inter la prezentitaj: Regularo § 5) ne atingis la plimulton, necesan por prezentado. Al la demando: „Ĉu vi deziras resti L. K.-ano?“ ĉiuj elirantaj kandidatoj respondis jese. Sur la voĉdono la prezidanto interalie donas jenajn konsilojn al la L. K.-anoj: Ĉiujn nomojn vi rajtas akcepti aŭ nur kelkajn: la titolo L. K.-ano devas esti atesto de lingva kompetenceco, ne rekompenco por eĉ tre gravaj propagandaj servoj. Ni tamen ne estu jam nun tro severaj en niaj elektoj, sed simple sufiĉe severaj! — La vortoj „x elektoj“ en la listo (Por kelkaj lingvoj estas pli multas da kandidatoj proponitaj ol elektoj). — Red.) ne forprenas de vi la rajton elekti ĉiujn, ĝi estas nur konsilo, por eviti, kiel estas novaĵ kandidatoj, la trogardon de la nombro (jam sufiĉa) de la L. K.-anoj kaj konservi ian proporcion (se ne ankoraŭ perfekte juŝtan, tamen jam multe pli ol antaŭe) inter la diversaj lingvoj. La elirantaj membroj estas re-elekteblaj.

En 1914 la franca lingvo havis 35 reprezentantojn, sed la angla nur 18 kaj la germana 15.

Deviga Instruo de Esperanto en komunistaj lernejoj de urbo Barnaul, Sib., Altaĵa distrikto.

„Novaj Tempoj“ disponigis al ni koplon de letero de nia s-ano pastro Serišev, kiun ni ĉi-sekvante publikigas:

Mi ricevis hieraŭ leteron de mia fratino f-ino Varvara Sereŝeva (kiu estas instruistino en la Lernejo de III-a Komunista Internacio en Barnaul) kaj de mia alia fratino s-ino Vera Ĥimelevskaĵa (kiu estas edukistino en komunloĝejo de la sama lernejo), ke Esperanto estas jam farita, kiel deviga studobjekto, en la 4-a, 5-a, 6-a, 7-a kaj 8-a jaroj (klasoj) de tiu lernejo. Sed ili plendas, ke estas malfacile legi dum leciono kun la tuta klasanaro ian rakonton, havante nur unu libron; tial ŝi petas min alsendi almenaŭ 10 ekzemplerojn de la libro por kuninfana legado (ekzercado). Neniu havante, mi ne povas tion fari kaj atentigante la fuimondan Esperantistaron pri graveco de tiu ĝojiga fakto de anprogramigo (oficiale) de Esperanto en la popola lernejo, mi petas:

1. Ĉiujn Esp. grupojn alsendi ĵaŭ adreso: Sibirio, Altaĵo, urbo Barnaul, ŝkola de III-a Kominternio, al Esperantistino Instruistino Varvara Seriševa, por la lerneja Esperanta grupo, la sociajn sulutesprimojn kun multaj subskriboj de ĉeestantoj, adresitaj je nomo de V. Seriševa, de direktoro s-o Krasnousov kaj Esperanta ĝelern-antaro;

2. alsendi po 10 ekz. (de l' grupa nomo) de la legolibreto aŭ broŝureto por klasa kunlegado. Kroni tio mia fratino, kiel instruistino de Esperanto, serĉas en la tuta mondo ĝekorespondantojn per poŝtkartoj por sia ĝelernantaro. Skribu al ŝi „por la grupo de Esperanto“.

Ni ĉiam helpadu nin reciproke!

Pastro J. Serišev, vicdel. de UEA, urbo Ĥarbin, Ĉinujo, Manĝurio, New-Town, poste-restante.

„Se via malamiko malsatas.“

La scivolemaj rigardoj de l' vilaĝanoj vagadis de unu virina vizaĝo al alia en la malvarmeta, preskaŭ senmebla ĉambro de la urbeta juĝejo. Du virinoj sidis sur benko: maljunulino, kiu okaze ĉirkaŭrigardis sentime, kaj junulino, bonaspekta, laborista edzino, kun ruĝaj vangoj, blondaj haroj kaj bluj okuloj, kiuj karakterizas la pli multon el la orientanglaj kamparanoj. Ambaŭ estis pure kaj simple vestitaj. Certe ne ordinaraĵ krimulinol, kvankam ili mallevis la okulojn kaj havas iom malserenan esprimon. La policano rigardis ilin maltrankvile. Aŭdigis voĉoj, bruaj paŝoj. Eniris laŭmode vestita sinjoro, sekva de prosperaspektaj farmistoj. La sinjoro sidigis sur la centra brak-seĝo; la aliaj okupis la flankajn sidlokojn.

„Penelope Nunn?“ demandis la sinjoro.

La maljunulino stariĝis kaj riverencis. Ĉiu atente aŭskultis, dum oni priparolis la krimon de Penelope. Ŝi loĝis apud arbaro, kie militkapitoj laboris sub komando de soldatgardistoj. Oni trovis en la arbaro bulketojn, kaj baldaŭ montrigis ŝia kulpo. Malbona afero, doni nutraĵon al malamiko! Ĉu ŝi havas ion por diri pri sia malobeo al la leĝo?

La manoj de Penelope tremis, sed ŝi respondis klare kaj malrapide: „Mi ofte eniras la arbaron, ĉar oni permesas al mi kolekti hejtajon post la morto de mia edzo, mortpafita de ĉasĉelisto. Iun tagon mi aŭdis du junulojn plendantajn pri malsato, k'uj ne vidis min, ĉar mi estis kaŝita. Mi timis la kapitojn. Oni diris, ke ili estas nefidindaj sentaŭguloj, sed ĉi tiuj estis junaj, agrable aspektaj. Mi kompatis ilin, ĉar ili estis palaj kaj lacaj. Dimanĉan matenon, la pastro legis en la preĝejo:

La kongreskotizoj.

Brita samideano petas nin pri publikigo de sekvantaj linioj:

En sia artikolo „Aktualaj kongresdemandoj“ en ET 126 D-ro Ledermann interalie tuŝis la problemon de la kongreskotizoj. Ankaŭ mi deziras iom paroli pri tiu temo.

Laŭ mia opinio, la kotizoj fiksitaj por bonvalutuloj ne estas tro altaj, sed la kotizoj por malbonvalutuloj estas nepre tro malaltaj. Ili estis tro malaltaj jam de la komenco. 200 gmk. estis en septembro jam bagaĵelo, ĉar ili egalvaloris al malpli ol unu ŝilingo aŭ svisa franko. Do jam tiam la kotizo fiksitaj por bonvalutuloj estis dudek-ĝis tridekoble tiom alta kiom estis la kotizo fiksitaj por malbonvalutuloj. Konsentite, ke en malbonvalutaj ŝtatoj la ekonomia situacio estas malbona; — sed mi opinias ke rabato de 80% plene sufiĉus, t. e. ke malbonvalutuloj pagu minimume la kvinonon de tio, kion pagas bonvalutuloj.

La sekvo de tiu malproportcia favorigo de malbonvalutuloj povas fariĝi danĝera. Jam nun minimume kvar kvinonoj de la anoncitaj kongresanoj estas germanoj, german-aŭstroj kaj poloj. En Praha oni jam plendis pri tro multe da ĉeĥoj, sed tie ili estis nur la duono de la kongresanoj. En Nürnberg la germanoj reprezentos tri kvaronojn de la tuta kongresanaro. Ĉu oni jen povas ankoraŭ paroli pri vere internacia kongreso? — Krome, la miloj da germanaj kongresanoj kaŭzos al la L. K. K. multe da laboro, koncerne registron, loĝigon ktp., sed ili pagis preskaŭ neniom; tiuj, kiuj aliĝis pagante 200 mk., eĉ ne pagis la kostojn por la kongresinsigno. Se la kongresa kaso fine havos deficon, tio estos ŝuldata al la malproportcia (por ne diri malĵusta) fikso de la kongreskotizoj.

Do, interese de la internaleco de la kongreso kaj interese de la kongresa kaso estas necese, ke la L. K. K. tuj fiksu proporcian kotizon por malbonvalutuloj (minimume 10 000 mk.) kaj poste plialtigu tiun kotizon konforme al pia senvoluliĝo de gmk.; plue, ke la L. K. K. postulu de jam aliĝintaj malbonvalutuloj postpagon, kiu kovras la diferencon inter la pagita kaj la pagota kongreskotizo. Mi scias, ke germana laboristo gajnas pli ol 10 000 mk. en unu labortago, kelkaj gajnas eĉ duoblon; ĉu iu angla laboristo gajnas en unu tago unu pundon? Sekve per germanoj estas multe pli facile pagi eĉ 20 000 mk. ol por anglo pagi unu pundon. Nun germano pagas 1000 mk., t. e. nur la centono de tio, kion pagas anglo.

Estas ja komprenebla la deziro de la L. K. K. imponi per kongreso multinombre vizitofa; sed por kongresanoj estos pli agrable trovi malmultajn samideanojn el multaj landoj ol trovi multajn samideanojn el malmultaj landoj.

Rim. de red. — Ĝenerale ni devas konsenti kun la opinio de n'a brita samideano. La vizito al la kongreso kostos por germanoj 180—500 000 mk. aŭ pli, laŭ hodiaŭa prezoj. Do kotizo de 10 000 mk. ne ŝajnas tro alta. — Antaŭ kelkaj semajnoj, ĉe kunveno de la aranganjoj de internacie ĝena Kongresakaravano, oni proponis fiksal por germanoj kotizon de 2000 mk. (por bonvalutuloj 2 avla. fk.), sed konsiderante, ke la kotizo por Nürnberg estis nur 1000 gmk. oni decidis provizore ne fiksal kotizon por germanoj. — Iaterempe Nürnberg ja plialtigis la kotizon por malbonvalutuloj ĝis 8000 mk.

La virinoj kaj la XV-a.

Komencinte okupi min pri Esperanto, mi pli kaj pli multe ekkomprenis, ke Esperanto povus esti multvalora helpilo al la virinoj en iliaj plej specialaj taskoj: Flegado de la helmecca vivado kaj edukado de la infanoj, almenaŭ por tiuj patrinoj, kiuj opinias, ke la edukado celas kosmopolitecon. En nia eksĉitita tempo estas psikologie kompreneble, sed tamen bedaŭrinde, ke la lernejo ne ĉiel respektas la ĝepatrajn rajton pri objektiveco. La instruisto ofte unuaviĉe estas naciistato, soci-

alisto aŭ io alia, kaj ni renkontas hrdiaŭ malofte vere harmonian homon, kian la infanoj bezonas. Jen, pro kio niaj infanoj eniras en la vivon havante diversajn antaŭjuĝojn sed ne kapablon aŭ eĉ bonvolon por kompreni kaj memstare prijuĝi la homojn kaj la okazojn. Do, la patrinoj mem devas trovi rimedon por forigi tiujn mankon kaj kontraŭon kiuj spite al „ĝepatra konsilantaro“ ofte ekzistas en lernejo kaj hejmo.

Tiurilate povas fari grandan servon Esperanto. Per lernado de tiu ĉi lingvo estas vekata intereso en la infano pri aliaj landoj kaj popoloj, kaj la miloj da aktualaj demandoj, kiuj devas esti respondataj, donas al komprenema patrino okazon plivastigi la rigardon de la infano kaj gvidi ĝin kelkajn paŝojn sur la vojo al nobla homeco.

Cu ni virinoj fine havas pli grandan malamikon ol la militon, ruiniganton de niaj hejmoj kaj detruanton de la vivlaboro de milionoj da virinoj? Ĉu ni ĝis nun tute komprenis la signifon de internacia lingvo por la paca ideo?

Speciala Virina Kunsido estas projektata por la XV-a. Ĉu tiuj ĉi vidpunktoj povos estiĝi ĥazo por nia fruktodona konferenco?

s-ino *Signe Wollter-Pfister*, Nürnberg, Banderstr. 17.

Pioniro — kia li ne estu.

(El la neeldonita verko „Rememoroj de Esperantisto“.)

De *At. D. Atanasov*.

Noto Ĉi tie mi prezentas la sepan ĉapiron el miaj „Rememoroj“. Por la tuta verko estas serĉata eldonisto.

A. D. A.

Do, en nia klaso ni estis tri Esperantistoj. Parolante ofte pri Esperanto, ni baldaŭ interesis la tutan klason.

Mi tre intlime amikiĝis kun unu el la du trovitaj Esperantistoj — kun *Aleksander Siŝmanov*. Li estis iom pli aĝa ol mi, kapabla kaj erudita junulo, multon leginta, multon vidinta, multe pensinta, kun la moderna filozofio, adoranto de la modernaj tendencoj en la literaturo kaj en la arto. Kun la instruistoj li estis en tre intimaj rilatoj, ili ŝatis lin kaj lin konsideris kiel maturan plenanĝan viron.

Siŝmanov sciigis al mi, ke en nia urbo loĝas fama Esperantisto el Ruslando, membro de l' Esperanta Akademio, kiu lernas la bulgaran lingvon; Siŝmanov mem instruas al li tiun lingvon. Tiu ĉi fama Esperantisto estis s-o *Nikolaj Evstifejeff*.

De tempo al tempo Siŝmanov alportadis en la klason iun Esperantan libron, prenitajn de s-o Evstifejeff. Kompreneble, tiu bone efikis por la propagando.

Tiel, iom post iom, en nia klaso Esperanto komencis ĝui bonan opinion. Neniu konsideris ĝin bagatelo fantazia. Tio estis jam la unua sukceso.

Sed, se en la klaso nia triopo povis prepari grundon por agado, ekstere, inter la ceteraj homoj, mi ekkonis la maldolĉecon de batalado por kompromilita afero.

Vi certe demandas: kial do kompromilita?

Nun, estas necese, ke mi rakontu ion el la historio de l' ĝistluma Esperanta movado en nia lando.

En tiu tempo ankoraŭ vivis la eble unua bulgara Esperantisto, tiu eldonis la unuan lernejolibron de Esperanto por bulgaroj kaj... kaj sukcesis plene kompromiti tiun belan aferon. Li estas la jam mortinta *Miloslav Bogdanov*. Lia „servo“ al Esperanto estis tia, ke eĉ nun ne estas tute sendanĝere elparoli liajn nomon publike en koncerno je Esperanto.

Tiu ĉi persono havis famon de ekscentrika, eĉ freneza homo. Estis advokato. Tiuj, kiuj lin konas, asertas, ke en iuj momentoj li posedis efektive elokventecon, saĝan rezonon; unuvorte, ke li estis kapabla advokato. Aliaj asertas, ke li estis naiva kaj stulta advokato, kiu nur ridigis

trovitof. Nur deksep jarojn li havis, bona filo li estis, gaja, sana, helpema. Lia patro kaj mi ne volis disiĝi de li, sed li insistis, ke li faru sian devon al la patrujo. Kiam li malaperis, mi ploris senĉese, mia koro pleniĝis per malamo kontraŭ liaj mortigantoj, sed post du aŭ tri monatoj ni ricevis plian informon, ke li estas kapita de la malamiko. Espero revenis en mian koron kaj granda ĝojo, kiam mi ricevis kelkajn vortojn: „Mi bone fartas, bonkora malamiko traktas min kiel filon, do ne maltrankviliĝu pro mi.“

„Mi pardonis la malamikojn, mi estis tiel ĝojplena; ke mi deziris ion fari por montri mian dankon. Unu el la kapitoj, kiuj preterpasis mian dometon, similis al li, kaj mi vidis, kiel malĝoja kaj senkuraĝa li estis vespere. Unu fojon, li preterpasis, ĵus kiam mi finis baki panon. Li rigardis min kaj diris kun malgaja rideto: „Tiu bona odoro min igas pensi pri mia patrino.“ Tiel surprizis min la anglaj vortoj, ke mi ne povis respondi, sed dum la nokto mi pensis multe pri mia filo. Proksiman vesperon, mi eniris la arbaron, vidis, kie li laboras, kaj signe montris la truitan arbon. Li komprenis kaj ĉiuvespere li trovis manĝaĵon tie. Ĉu mi ne rajtas trakti afable tiun junulon, por ke liaj samlandanoj traktu bonkore mian filon?“

Dum ŝia parolado, la magistrataro denove aspektis malserene. La ĉeestantaro murmuris simpatie, kelkaj ankaŭ havis filojn aŭ fratinojn en militkapiteco, eksterlande. Post konsiliĝo, la prezidanto proklamis la juĝon: „Thirza Mothersole, vi malkonvenas agis. Dum milito la devo de civitano devas superi la sentojn al patrino. Gardu vin, ke vi ne denove malobeu. Pagu dek ŝilingojn, ĉar tio estas via unua kulpo. Mi averias vin, ke vi malliberiĝos, se vi ripetos vian malobeon.“

onin per aplombaj frazoj pri tute malgravaj bagateloj. Kiu estas prava? En ĉiu okazo la famo de ekscentrikulo forpeladis klientaron, kaj li ne estis bonŝanca en sia profesio.

En la stratoj li estis objekto de rido. Lia ekstera aspekto mem estis komika en ĉies okuloj. Ordinare li marŝis senĉapele. Vintre sur la glitejo li faris tiajn movojn kaj turnojn, kiuj aliris al li ĉies atenton. Sed certe li tute ne komprenis bone, kion rigardas ĉe li la publiko, kaj kun duobligita fervoreco li faradis siajn fokusojn...

Kompromilita persono li estis.

Super ĉio li portis titolon „doktoro“. Oni digadis — kaj tio ŝajnas vera — ke li ne posedas doktoran diplomon kaj ke li meminciate proklamis sin doktoro.

Kiel superflua aldonajo al tiu amaso da kvalitoj, li tradukis sian bulgaran nomon Esperanto, aperis kun ĝi publike ĉie, ankaŭ en la juĝejo... kaj sukcesis definitive ridindigi sin kaj la Esperantistojn, kiu bedaŭrinde estis ligita kun lia nomo. Jen tia homo estis prezentinta unue Esperanton al nia publiko.

Mi povis vidi dum jaro 1921 en la Nacia Biblioteko en Sofio la de li verkitan lernolibron. Eĉ se oni ne konus la aŭtoron, per la verko mem oni povus kompreni, kia li estas kaj kian „ursan“ servon li faris al Esperanto. Antaŭ ĉio li, nekontenta pri la bulgara ortografio, arbitre akceptis novan — sian propran — kaj, mendinte novajn specialajn litojn por tiu ortografio, li sentime preigis sian lernolibron per ĝi. Ne estante filologo, li kompreneble ne povis trovi eĉ ion almenaŭ tolereblean novan.

En la antaŭparolo de la lernolibro li tuŝas la problemon pri lingvo internacia, la problemon pri la bulgara ortografio, pri la registemo, pri la anarkiismo, kies adeptoj li ŝajnas esti. Li kritikas la bulgaran ortografion kaj pledas la sian. Li pentas en la sama antaŭparolo pri tio, ke antaŭ jaroj, kiam princo (poste reĝo) *Ferdinand* venis en Bulgardanon, li verkis bonvenigan odon kaj publikigis ĝin en la ĵurnalo „Slavjanin“ (slavo); li deklaras, ke *Zahari Stojanov* (fama bulgara revoluciulo kaj historiografo de la kontraŭturkaj ribeloj) lin akcelis al tiu verko. Por nuligi sian pekon, kiun li faris per tiu versaĵo, li promesas dediĉi sin ĝis la morto je ideala servado al la homaro kaj agidi kontraŭ la reĝoj kaj la regantoj... Ĝenerale, la antaŭparolo prezentas haoson de plej malsamaj ideoj, hazardaj kaj malsagace kunigitaj.

La lernolibro mem montras, ke li sufiĉe bone komprenis kaj ellernis Esperanton, sed li suferis pro la komuna difekto de multaj bulgaroj, uzantaj fremdan lingvon: li tro sklave sekvas la bulgaran frazon, li ne kuraĝas eĉ plej malmulte defianĝiĝi de la vortordo, logikigi ion la neklarajn idiotismojn. Unuvorte, li posedas korekte la lingvon, sed stilon Esperantan li nek havas, nek prizorgas.

La sama pioniro eldonis ankaŭ la unuan Esperanta-bulgaran gazeton „Mondlingvisto“, ankaŭ en sia stranga ortografio. De ĝi aperis kelkaj numeroj.

Cu estas bezone diri, ke tiu komenco de la Esperanta movado en nia lando estis tre malmutila por la tuta afero? La unua pioniro ĝi kompromite prezentis Esperanton, ke dum multaj multaj jaroj poste oni ne riskis nomi sin malĉefe en Sofio „Esperantisto“. Sufiĉa estis la kruela moko: „Ĥa vi do lernas la lingvon de Diodono!“, por malvarmigi multajn adeptojn de Esperanto. Oni eĉ malofte kuraĝis ekparoli serioze pri Esperanto!

Pli malfrue Bogdanov verkis sian propran projekton de lingvo internacia, ian kriplan similon de Esperanto, komencis eldoni humoran ĵurnalon en ĝi, kaj per tio li verŝis superfluan guton en la glaso plenplena je mokoĵ pri lia persono kaj pri Esperanto — ambaŭ jam objektoj de bulgaraj humorgazetoj...

La vilaĝano ne deziris reparoli, sed la magistrato rifuzis aŭdi pli multon. Sia edzo pagis la monpunon, kaj ili malĝoje eliris.

Ekstere, kelkaj personoj kolektigis ĉirkaŭ ili kaj ŝi plorante diris: „Eble la malamikoĵ aŭdos pri tio ĉi kaj malpermesos nutri mian filon.“

La ĉirkaŭstarantoj konsolis ŝin dirante, ke sendube neniu eksterlande ekscios tion, kio okazis.

Sed ĉiufoje ŝi ŝtelrigardis el post la kurteno, kiam preterpasis la militkapitoj.

Unu matenon ŝi trovis sub la pordo falditan paperejon, sur kiu ŝi legis: „Ne malĝoju, sinjorino, vi nutris ne nur mian korpon sed ankaŭ mian animon, ĉar nun mi scias, ke simpatiaj koroj troviĝas ĉie. Korpa malsato ne estas grava, sed spirita malsato velkigas la animon.“

Emma L. Osmond, London.

En arbaro nokte.

Laca, kousumita de tuttaga vagado tra la arbaro, kiun jam tuŝis la flava kiso de aŭtuno, mi venis al malgranda arbara kampeto. Densaj muroj de kverkoj, betuloj kaj plejparte de tremoloj ĉirkaŭis ĝin. En la mezo de tiu herbejo vidigis spegula marĉa lageto kun ruĝebruna rebriolo apud la senkonturaj bordaj deklivoj. Ĉe la dekstra flanko de l' herbejo staris dometo, supozeble de arbaristo. Iam venis la vesperaj krepuskoj. Mia amiko, ĉashundo Nox, explore kuris al la dometo, larĝe malferminte la makzelojn, kun malfacila spiro. Ĉirkaŭkurinte la dometon, ĝi revenis al mi kaj ekrigardis en miajn okulojn, kvazaŭ demandante, ĉu ne estas jam la tempo por la dezirata ripozo.

Amike mi tuŝis ĝian kapon. Mi mem benis la sorton, vidante la dometon. Nia ripozo estos certigita, mi antaŭsentis jam la feliĉon demeti la

La Esperantistoj el la pli novaj generacioj malfacile povus prezenti al si la cirkonstancojn, en kiuj laboris tiam la propagandistoj. Nomi sin „Esperantisto“ — tio per si mem estis heroaĵo. Al simila kuraĝulo nur malmultaj ne ekrigardus kiel al frenezulo kompatinda. Eĉ ne unu konsolan, aproban vorteton povis aŭdi tiam la bulgaraj Esperantistoj el la buŝo de kiu ajn bulgara scienca aŭtoritato.

Tute aliĝis la afero de tiam. Por atingi de tiu terure kompromitita stato, ĝis enkonduko de Esperanto en la lernejojn per la parlamento — ĉu vi komprenas, kiom devas esti aliigata la publika opinio?

Dum multaj, multaj jaroj la bulgara Esperantistaro, precipe la sofia, kondukis silentan bataladon por regajni la bonan nomon de Esperanto, kian ĝi meritas. Ili sukcesis per kaŝita, superhoma laboro forruliĝi la grandan ŝtonegon de la malbeno de kompromiteco, kiu kuŝis sur nia sankta afero.

Kiel okazis tio? — Ho, kiu povus penetri en tiun labirinton de malsimplaj vojojetoj, tra kiuj plenmano da sentimaj batalantoj pasadis, por almiti la publikan opinion, prezenti Esperanton en bela lumo, kaj, gajnante personon post persono, grupeton post grupeto de la socio, gajnante la simpaton de eminentuloj, akiri tian pozicion, de kia jam estas komencebla serioza agado?

Se la merito de la ĝisnunaj bulgaraj Esperantistoj estus nur tiu ŝanĝo de la publika opinio, eĉ en tiu okazo ĝi estus netakseble granda kaj dankinda.

Esperanto-gazetoj por Scienco.

Ne timu, legantoj, ke mi denove intencas tedi vin per longa prediko aŭ plendaĵo. Koncerne Esp. gazeton por Scienco mi jam lernis paciencon. Nur permesu al mi kelkajn konstatojn:

Kiam mi akceptis la eldonadon de „Internacia Scienca Revuo“, mi scis, ke en la komenco ĝi postulos grandajn oferojn de la eldonanto, sed mi atendis, ke la Esp. sciencistoj unuanime subtenos ĝin. Intertempe du kajeroj estas preŝitaj sub malfacilegaj cirkonstancoj; tria estas en preĝaro. La defcito kompreneble estas granda, kaj ĝis fino de la unua eldonoĵaro ĝi atingos kelkajn milionojn da germ. mk.

Nun D-ro Mezeľ, Teréz-Körtl 4, Budapeŝt VI, Hungarujo, eldonis novan sciencan revueton „Internacia Medicina Revuo“, kaj D-ro Briquet, 81 rue de la Bassée, Lille, Franc., alian „T.E.K.A.“

Mi ne volas riproĉi al ambaŭ doktoroj la fondon de la specialfakaj revuetoj. Male mi tute kore rekomendas la revuetojn al la koncernaj fakanoj (kuracistoj kaj apotekistoj). Sed samtempe mi proponas al D-roj Mezeľ kaj Briquet, ke ili ree kunigu siajn revuetojn kun „Internacia Scienca Revuo“ kaj mem transprenu ties eldonadon. Plezure mi rezignos.

T. J.

IREKO.

Internacia Rejna Karavano.

La je la 28-a de februaro en Godesberg okazinta kunsido de la estraroj de Rejna-Vestfalia Esperanto-Ligo (Revelo) kaj de la Koblenza grupo rezultigis, ke ĉi tiu sola organizos Irekon. La karavana programo estas fiksita jenmaniere:

Kolektiĝa loko por la karavano estas Koblenz. Oni atendos ĉi tie la partoprenontojn je lundo, 30. julio. Posttagmeze la alvenintoj rigardos la vidindaĵojn de la urbo. Vespere estos oficiala internacia festkunveno. La postan tagon (31. 7.) matene oni suriros vaporŝipon, por ĝui dum kvin-hora veturado la plej belan parton de la rejna valo. De Rüdeshelm vagonaro portos la karavanon al la konata foirurbo Frankfurt apud Majno. Tie noktuminde, la partoprenantoj vizitos

pezan, plenan ĉasosakon, tranĉantan per sia rimeno la ŝultron, forĵeti la tedajn, pezegajn botojn kaj etendi la piedojn. Mi iris ĉirkaŭ la angulon de tiu arbara dometo, intencante frapi sur la pordon, kiam mi kun miro rimarkis, ke ĝi ne estis ŝlosita, nek eĉ firme kovris la enirejon. Ĝia mal-supra ĉarniro estis rompita, oblikve ĝi pendis sur la supra, kaj tra la malfarmajo mi povis observi la malplenan ĉambreton sen iaj signoj de loĝebleco.

Mi malfermis la pordon, eniris la solan ĉambron de la dometo kaj tuj ekvidis, ke efektive neniu loĝas en ĝi. Forestis la mebloj, forestis kelkaj vitroj en la fenestroj, malatente farita argila forno ruinigis. El sub la plafono, kun malkvieta bruo, elflugis la birdo. Unu sola larĝa sidtabulo estis metita inter la kadroj de la du kontraŭaj fenestroj. La planko estis malnova, ĝi knaris, ĝiaj tabuloj en kelkaj lokoj mole fleksigis kaj trarompigis sub miaj piedoj.

Ne tion mi atendis trovi por la ripozo, kaj maldolĉa disreviĝo, kune kun laceco, kapitis mian penson. Tamen mi estis en la nekonata loko de l' arbaro, tute laca; rapide proksimiĝis la nokto, ne restis por mi alia eliro ol atendi la matenon en tiu domero. Mi demetis la sakon, pafilon, alportis el la arbaro kelkajn densajn branĉojn de betuloj, metis ilin sur la interfenestran tabulon kaj eksidigis sur tiu improvizita lito. Nox atente flaris tra la ĉambreto, poste sidigis ĉe miaj piedoj, atendante sian parton de la vespermango. Ĝi ne estis tro riĉa, nia vespermango. Kelkaj pecetoj da jam seka pano, sekaj ĉasistaj kolbasetoj, skatoleto da konservita fiŝo kaj tri, kvar glutoj da konjako estis ĉio. Mi amike dividis la vespermangon kun Nox, kaj baldaŭ ĝi jam spiris apud miaj piedoj per ritma sonĝa spiro, nur lafoje dum miaj moviĝoj batante la plankon per sia vosto.

Je merkredo (1. 8.) matene la vidindaĵojn de la urbo. Tagmeze ili daŭrigos la fervojan vojaĝon kaj atingos ĝustatempe la kongresurbon. Jen la ĝenerala iom ŝanĝita plano.

London antaŭtagmeze okozos en Koblenz laborkunsido de la Revelanoj.

La Ireko-kotizoj estos por

Belgoj	5 frankoj	Hispanoj	2 pesetoj
Britoj	2 ŝilingoj	Italoj	7 liroj
Danoj	2 kronoj	Holandanoj	1 guldeno
Ĉeĥoslovakoj	15 kronoj	Norvegoj	2 kronoj
Finnlandanoj	15 markoj	Svedoj	2 kronoj
Francoj	5 frankoj	Svisoj	2 frankoj
Germanoj	(fiksota)	Usonanoj	1/3 dolaro

Oni pagu nur per monbiletoj de sia lando (ne per poŝtmandatoj)!

La anoj de aliaj ŝtatoj ol la supre nomitaj sendu 10 malnovajn respondkuponojn aŭ 5 novajn kun ruĝa surpreso nove stampitajn.

Anoncu fuĝ vian partoprenon, por ke ni eksclu pliel baldaŭ la proksimuman nombron de partoprenontoj. La unuaj 50 aliĝontoj ricevos donacaĵon pri Koblenz.

Por aliĝi alsendu vian kotizon, sciigante samtempe vian precizan adreson (klara skribo!) kaj, por kiuj punktoj vi deziras noktloĝejon (de 1-a, 2-a, 3-a rango) en Koblenz kaj Frankfurt. La aliĝintoj ricevos partoprenan karton.— Adreso: Esperanto-Grupo, Florinsmarkt 7 a l, Koblenz, Germanujo.

Ni respondos nur demandojn, al kiuj estas aldonita nove stampita respondkuponono. Por ŝpari multajn demandojn kaj al ni respondojn, oni bonvolu regule tralegi la oficialajn sciigojn en ET, kaj aliaj Esp. gazetoj.

Esperanto-Grupo de Koblenz.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Bulgarujo.

En Jambol'a supera reallernejo 40 gegimnazianoj el VI-a klaso partoprenas dufoje semajne nedevigajn lecionojn. Ankaŭ estas malfermita ĉiudimanĉa kurso (atgm. 10—12 h.) por webanoj (?). Partoprenas pli ol 45 gekursanoj. Kursgvidanto s-ano Dojĉo Kolev, fervoja stacidomestro.

D. K.

En Tirnovo la intereso por Esperanto pli kaj pli vigligas, tiom pli ĉar nia X-a kongreso okazos en nia urbo. Post fino de l' unua kurso por ĝeurbanoj, ni malfermis la 10. marto duan, gvidatan de A. Pomakov. Perfektigan kurson baldaŭ komencos H. Baĉodarov. Multaj samideanoj preparas sin por partopreni je nia XV-an en Nürnberg.

G. D.

Germanujo.

En Zittau (Saksujo) la tiea „Societo Esperanto“ aranĝis la 17. febr. varbparoladon, je kiu ĝi speciale invitis la ĝeinstruistaron kaj la lernejestrojn. Parolis la prezidanto de la Germana Ligo de Instruistoj Esperantistaj s-o Schramann el Weinböhla. La pro diversaj malhelpaĵoj ne tre granda aŭskultantaro akceptis le paroladon kun granda aplaŭdo. En „Höhere Töchterschule“ (filina liceo) Esp. instruado estas enkondukata septembron 1925 aŭ Paskon 1924.

La 10. marto okazis Amuza Vespere en „Hotel Augustin“, kiun ĉeestis pli ol 100 personoj (preskaŭ 70 Esperantistoj). La programo enhavis recitaĵojn en germana kaj Esp. lingvoj, Esp. teatraĵoj, kantojn kun liuto, prezentadon de la germana danco „Schuhplattler“ kaj muzikaĵojn de bona orkestro. Poste sekvis dancado „ĝis senfino“.

La 17. marto s-ano Knoll faris filmprezentadon pri „Nürnberg kaj Rothenburg“ kun parolado pri la XV-a. Nova kurso komenciĝis la 21. febr. kun 28 p.

Koka.

Hungarujo.

En Miskolc okazis la 11. febr. ĝenerala kunveno de la grupo „Harmonio“; samtempe estis la unua datreveno de ĝia fondiĝo. El raporto pri la agado de la grupo, forsendita bedaŭrinde nur la 12. marto, ni citas: Kunvenoj kun paroladoj kaj deklamaĵoj okazis la 12. kaj 26. nov. 1922; la 17. dec. Zamenhof-festo; la 25. jan. la prez. Prof. König paroladis en Sportunuigo de la Miskolcaj Privatoficeistoj kaj Komercaj Komizoj, por kiu nun gvidas specialan kurson s-o König. Alian kurson li komencis la 5. febr. Literatura konkurso okazis la 11. marto.

Japanujo.

En „La Revuo Orienta“ de januaro ni legas pri eksterorde multaj kursoj en Tokio, Kiriu, Okazaki, Nagoja, Sin-Maizuru, Osaka, Niihama, Nagasaki kaj alie; sed ŝajnas al ni, ke niaj japanaj samideanoj havas sian specialan percepton pri la vorio „kurso“, identigante ĝin kun „pre-

La krepusko ŝanĝiĝis je nokto. Post duon-hora plena mallumo, iu stranga brilo fairere ekstis inter la arboj, kaj kelkajn minutojn poste, rigardinte en la ĉielon, mi komprenis, ke ie ĉe la nevidata horizonto aperis la luno.

Kuŝante sur la odoraj betulaj folioj, kovrite per mia varma jaketo, mi ne deziris dume dormi, meditadis kaj sencele rigardis la fenestron, de kie mi vidis la malhelan marĉan lageton, la nigran muron de arboj je cent paŝoj malantaŭ ĝi kaj super ĉio la brilon de serena nokta ĉielo, lumigata de luno el post la tranĉe konturita arba muro. Tiel pasis kelkaj horoj.

Ĉirkaŭ noktmezo, iu naĝanta lumeto subite aperis super la lageto kaj speguligis en ĝi. Poste venis dua, tria, multaj. Kun malfacilo batalante kontraŭ jam aperinta dormemo, mi rigardis la fenomenon kaj deziris klarigi ĝian kialon. Mi ofte aŭdis pri tiuj migrantaj lumoj, ĉiuj ĉasistoj scias rakonti pri ili, kaj tamen illa apero elvokis timan tremon en mia estaĵo.

La lumetoj naĝis en la aero komence kvietaj, poste eksaltis dancante, aŭdiĝis la bruo, sonoro, kantado, kaj subite sur la kampeton el la malluma arbaro komencis aperi malhelaj homaj figuroj. Iliaj paŝoj ne estis videblaj, ili kvazaŭ rapide flugis super la herbejo, kaj ĉiuj sin direktis al mia dometo. Malvarma tremo kuris tra mia dorso, miaj haroj kun doloro stariĝis. Rekte al mi flugis sur balailoj teruraj sorĉistinoj, kun malical, nehomaj vizaĝoj, diablaj mlenoj, brilantaj okuloj, flirtantaj neligitaj haroj.

Mi konsterniĝis, volis min ien kaŝi, sed ek-sentis min ligita de iu supera forto. Ĉiuj membroj de mia korpo ĉesis obel al mi, mi ne povis eligi eĉ unu sonon, nur la okulojn premis tiu timiga bildo.

lego“, „lekcio“ aŭ simila. Ni estus dankemaj, se japana leganto bonvolus tion klarigi al ni, ĉar ni ne povas kredi pri tiom da efektivaj kursoj en Japanujo. Laŭ nia percepto kurso signifas serion da lecionoj, post kies finludo la partoprenantoj pli malpli perfekte scipovas la lingvon.

Litovujo.

Kaunas. En Litova Universitato finiĝis la unua kurso kaj la lektoro s-o P. Medem jam faris la enkondukan lecionon por dua kurso; ĉeestis 80 gestudentoj.

Mariampolė. Formiĝis grupo kun 35 membroj. Kurson gvidas s-o Prapuolenis.

Svislando.

En tri urboj de „Tiĉino“: en Lugano sub la aŭspicioj de la Komerca Ĉambro, en Bellinzona de la ŝtudenta societo „Soflingia“ kaj en Locarno de la Societä Impiegati di Commercio, D-ro Privat parolis antaŭ klera publiko pri „Neceso de komuna komerca lingvo“. La propagando estis granda, kaj tui komenciĝis kursoj, en Lugano kun 20 p., en Bellinzona kun 50 p. (instruas Prof. Pedrolì), en Locarno kun ĉ. 60 p. (instruas Maestro Lanfranchi). La grupoj progresas.

Is.

Submarula Esp. Grupo.

Dank' al klopodoj de leŭtenanto Kaŭaŝima fondiĝis Esp. grupo de „submaruloj“. Ĝi havas membrojn ĉe japanaj submarboatoj 18, 21, 42, 43 kaj 15-a Torped-boataro, en Makoo (Formoso) kaj haveno Sasebo. Ankaŭ aviadisto leŭt. Aŭaja propagandas en Sasebo por Esperanto.

Por „Esperanta Ligilo“

ni ricevis: 245. Hans Ifländer, Breslau 1000 gmk.

Skoltismo.

Suda Londono. — Oni iniciatis kurson por skoltoj en la distrikto Balham & Tooting, sub la aŭspicioj de la loka skolta organizajo. Jam aliĝis ĉ. 20 skoltoj el diversaj tieaj trupoj, kaj loka ĵurnalo dufoje presigis en sia skoltangulo artikolojn pri Esperanto kun anoncoj pri la kurso. La instruanto estas nia fervora samideano kaj eksskolto G. T. Smith.

F. E. W.

Scienco.

La 70-an datrevenon

de sia naskiĝo festis la 16. marto Prof. D-ro Heinrich Gustav Kayser, mondkonata fizikisto, Direktoro de la Fizika Instituto ĉe la Universitato Bonn, aŭtoro de „Manlibro de Spektroskopio“, honora membro de Royal Institution Fellow de Royal Society en London, koresp. membro de la Akademioj de Petrograd kaj Lund (Sved.), honora doktoro de Dublin, kuneldonanto de Astrophysical Journal, ktp.

Komerco.

Finnlanda Foiro

komunikas, ke ĝi decidis, dum la foira semajno (1.—6. julio) aranĝi ekspozicion de sia per-Esperanta reklamo, por influi la komercistaron de Finnlando ekuzi Esperanton. Samideanoj ĉiulandaj zorgu, ke plejeble multaj artikoloj pri Finnlanda Foiro aperu en naciaj gazetoj, kaj sendu po unu aŭ kelkaj ekzempleroj de la koncernaj gazetoj al Finnlanda Foiro en Helsinki, Finnlando.

Nederlando.

En sia kunveno de 7. marto la Komerca Ĉambro en 's-Gravenhage esprimis sin favore al la utilo de la ĝenerala uzado de Esperanto por la disvastigo de la internaciaj komercaj rilatoj.

Francujo.

La Komerca Ĉambro de Perpignan, en sia lasta kunsido de 4 marto, adoptis la saman rezolucion pri Esperanto, kiun voĉdonis Komerca Ĉambro de Paris.

La maria numero de „France-Esperanto“ publikigis jenan liston de francaj komercaj ĉambroj voĉdonintaj favore al Esperanto: Avignon, Beauvais, Besançon, Béziers, Brive, Calais, Certe, Clermont-Ferrand, Grenoble, Limoges, Mâcon, Moulins, Paris, Le Puy, Saumur, St. Omer, Le Tréport, Tulle, Tarare, Vienne. — Favore kun

Ili parolis, ili krlis, ili disputis. Ili sidigis cirkle ĉirkaŭ mia dometo, kaj ĉies rigardo de tie estis direktita al mi.

Fine la bruo ĉesis, el la cirklo aperis unu altkreska sorĉistino kaj eniris mian ĉambreton. Senhelpan, apenaŭ konscian ŝi prenis min je la mano kaj elkondukis el la dometo. Ŝi kondukis min laŭlonge de tiu infera cirklo, poste sidigis min sur la teron kaj ekparolis al siaj kunulinoj.

Ŝi parolis per stranga lingvo, kiun mi ne komprenis. Poste sekvis al ŝi la respondoj, ek-krioj de multaj sorĉistinoj kaj — kio mirigis min — ili estis en diversaj parte konataj de mi, aŭditaj lingvoj, parte en neniam antaŭe aŭditaj. Ĉu tio do estis illa internacia nokta kunflugo? Tiu nokte ili elektis la lokon, kie mi dormis, por sia kongresejo!

(Daŭrigota.)

Diversaĵoj.

Sveda eltrovaĵo.

Petrolo-motoro faranta 1800 turniĝojn po minuto estas konstruita de sveda inĝeniero Arthur Wennerby en Halmstadt.

Motoro de tiu speco estas multe pli malgranda kaj malpeza ol la motoroj ĝis nun fabrikitaj, sed tamen ĝia forto estas pli granda kaj la funkci-igaj kostoj estas nur kvinono de la ordinaraj. Krom tio la nova motoro estas simpla kaj pli facile funkcigebla ol aliaj.

H. H.

Al rusaj elmigrintoj.

En Warszawa, Pollando, Franciszkanska 4 m. 24 (A. Markow) fondiĝis grupo de rusaj elmigrintaj Esperantistoj, kiu celas unuigi siajn samsortajn samideanojn en la tuta mondo por reciproka morala subteno kaj material-interŝanĝo. Interesuloj skribu al ĝi.

limigoj: Lyon. — Malfavore: Ambert, Arles, Dijon, Marseille, Oran.

La 6. marto la komerca ĉambro de Perpignan voĉdonis favore al Esperanto, aliĝante al la decido de la Parisa komerca ĉambro.

Por la konferenco de Venezia sendos delegitojn la foiroj de Paris kaj Bordeaux.

Ekspozicio kaj kongreso en Göteborg, Svedio.

Dum la somero — la tempo 8. majo kaj 15. sept. — okazos en Göteborg grandioza jubilea ekspozicio. Multajn eksterlandulojn oni atendas al tia ekspozicio.

Sveda Laborista Esperanto Asocio aranĝos kongreson dum la ekspozicio. La kongreso estas arangota la 28—31 de julio.

Samideanoj el diversaj landoj vizitontaj la urbon estas invitataj partopreni, oni sciigu pri sia alveno la administrejon en Göteborg.

Niaj samideanoj en Göteborg estas ankaŭ emaj helpi eksterlandajn samideanojn, kiuj krom la kongreso volas viziti la ekspozicion.

Nia sutsveda asocio dum la kongreso ankaŭ intencas aranĝi Esperanto-ekspozicion. Tial ni petas sendi al ni ĉiuspecajn reklamaĵojn, gazetojn, librojn ktp. Ni kvitancas ĉion per sendado de nia interesa kongresnumero de Sv. Lab. Esperantisto.

Adresu al: Sveda Lab. Esperanto Asocio, Göteborg.

Por la kongresa komitato

Einar Adamson.

Filatelio.

Svedujo. Poŝtmarko n-o 5 (ET 126) ne montras reĝon Gustav sed leonon. La eraron kaŭzis filatelista gazeto. Samtempe mi korektas eraron en Michelkatalogo 21/22: n-o 147, violkolora 180 ne ekzistas.

F. Ahnfeldt.

Internacia Sporto.

Ciklado.

La Seastage Ciklado en New York finiĝis per venko de la aŭstrala paro Goulliet-Gronda, kiuj iam gajnis la cikladon en New-York en la jaro 1914. Duaj estis Gasimann Lands, triaj Egg-von Kempen, kvaraj MacNamara-Horan, kvinaj fratoj Buyase. La ceteraj paroj restis poste. Entute estas pasigitaj 4058,760 kilometroj.

Boksado.

La aŭstrala pezulo Louis Jirpon venkis en New-York la usonan Bill Brennan en la 12-a rondo per „knock-out“. Ĝis nun oni konsideris Brennah kiel estontan kontraŭulon de la mondrekordulo Dempsey. Jirpon estas prete boksi kun Demsey.

La ira mezpezulo Mactigue venkis en Dublin (17. 5.) la negron Batling Siki, majstro de Eŭropo kaj de l' mondo. Batling Siki intencis boksi kun Charpentier la 16. sept.

Piedpilko.

Landa ludo Hungarujo-Svislando antaŭ 10000 spektantoj 6:1.

En Budapeŝt Suda Hungarujo venkis Okcidentan Hungarujon 2:1.

Rezultato de internacia piedpilka ludado inter itala kaj hungara naciaj trupoj en Genova (4. 5.) estis 0:0. Tiu ĉi ludo estis multe atentita de la itudropa sportistaro, ĉar nacia itala trupo ne estis ludinta kun nacia hungara trupo de dekdaj jaroj. La unua ludo, kiu estis la dua internacia por nacia itala trupo, okazis en Budapeŝt en 1910 kaj finiĝis per venko de la hungaroj 6:1. La duan en Milano (1911) ankaŭ gajnis la hungaroj 1:0. — En la ĵus okazinta ludo la italoj ne sekvis karakterizian italan, sed anglan ludmanieron; tio eble malhelpis la venkon al la itala trupo.

R. Camurri.

Nago.

Akva-plikludo okaze de internacia naĝfesto en Breslau, Germ., inter 8-a regiono Budapeŝt kaj Hellas Magdeburg finiĝis per venko de Budapeŝt 5:2.

Gazetaro.

El Hombre (La Homo), Mexico, 18. 2. Semajna revuo ilustrata kun longa art. de T. Susay pri „Esp. kaj ĝiaj progresoj“.

La Basilicata, 22. 2. — 11 Mattino, 1.—2. 5. — 11 Giorno, 10.—11. 5. — Aperantoj en Napoli, Italujo; enhavas art. pri la Esp. Konferenco de Venezia.

The Times, London, 25. 2. Art. de s-o Merchant, prez. de BEA. Glasgow Evening Times, Glasgow, 12. 2. Pri Venezia.

Le Cuir, Paris, ĉi. eldono, 18. 2. Pri Venezia.

Les Echos, Paris, 1. 3. Esp. kaj k. ĉ. de Budejovice, Ĉeĥoslov.

La Dépêche, Toulouse, 12. 3. Pri favora deziresprimio de k. ĉ. de Perpignan, kiu adoptis saman deziresprimon kiel k. ĉ. de Paris.

La Sentinelle, Chaux-de-Fonds, 27. 2. — Le Travail, Genève, 27. 2. — Gazzetta Ticinese, Lugano, 24. 2. — Pri Esp. agado de D-ro Privat.

Echo de Danube, Budapeŝt, 21. 2. Pri Esp. Akademio.

Vecer, Zagreb, 10. 3. Pri Venezia.

Vorwärts, Reichenberg, 24. 2. Esp. en Sovetruslando.

Reichenberger Zeitung, 15. 2. Esp. en Brazilujo. — 1. 3. Esp. vespero dum la Foiro de Leipzig. — 6. 3. Of. Esp. kursoj en la ĉsl. armeo. — 14. 3. Esp. lektoro ĉe teknika allernejo en Praha.

Latvijas Sargs, Riga, 4. 3. Esp. kaj lernejo. — 13. 3. Esp. konferenco en Venezia.

Tooting and Balham Gazette, 10. 3. Sub „Skolia Angulo“ represo de art. el ET.

Diario de Lisboa, 23. 3. (Enhavas intervjuon de la redakcio kun kolonelo John Pollen pri Esp. kaj Hindujo).

Les Echos, ĉs. eksporta revuo, Paris, 28. 2. (Art. „Esp. je la servo de la franca komerca disvastigo eksterlande“ de s-o Guérille.)

L'Ere Nouvelle, Paris, 1. 3. anoncas malferrnon de Esp. tribunio.

Parolejo.

157. Instigo adresata al la LKK de la XV-a!

Jam dekkvar bonege sukcesintaj universalaj kongresoj pravis al la mondo, ke Esperanto estas mirige vivipova kaj pli kaj pli difloradisa. La elekto kiel kongreslando kaj -urbo ĉiam estas sentata kiel granda, eksterordinara distingiĝo kaj ĉiu LKK sincere kaj sence penadis, nelorges-ebliĝi al la kongresanaro ĝuste sian kongreson per io nova, kio mankis al la antaŭaj. Pro tio ankaŭ ja ni povas havi la konvinkon, ke anka

nur Esperantaj kantaĵoj. Laŭ mi la invito al la plej konataj kantuinoj per la naciaj Esp. societoj kaj delegitoj de UEA estas klar la konkurso mem tre elika propagando por Esperanto, ĉar la diversaj konkursoj sufiĉe zorgos por la kiel eble plej vasta diaskonio de iliaj ŝanĝoj kaj sukcesoj. La perspektivoj, kiuj prezentigas je tio, ŝajnas esti pli ol nur kontentigaj. Cetere la konkursoj estas tre bona programpunkto por la kongreso mem kaj allogas la plej grandan parton de la ĵusurba loĝantaro kaj eble ankaŭ la mondon de la muzikistoj, komponistoj, kritikistoj, teatristoj ktp. Eble eĉ ĉiuj versaristoj estigos Esperantistojn, esperante, ke la proksima mondkongreso ili estos kantaĵoj. Sed, estu kiel ajn, mi opinias modeste, ke la instigo estas pripensinda. Do pripensu ĉiuj, kiuj emas pripensi proponojn. Se la ideo plaĉas, mi estos preta al la praktiko de l' organizo.

Jur. Dolf Halbedl, Graz,
Schulgasse 24, Aŭstrujo.

158. Transskribo de rusaj nomoj.

En ET 124, Diversaĵoj, La Lokomobila Bando, estas citita la rusa gazeto „Ekonomiceskaja Zhizn“. En la grafio de ĉi tiuj du vortoj mi trovas du litergrupojn nekonatajn al Esperantisto: ĉ kaj zh. Kiel ili devas prononciĝi? Neniu, kiu ne scias la rusan lingvon, povos ilin ĝuste prononci (respektive eĉ kaj ĵ). Kiel oni volas malfaciligi la facilan Esp. transskribon de tiuj vortoj? En la Esp. alfabeto ekzistas ĉiuj iliaj sonoj, kiuj povas pro tio fidele transskribiĝi: Ekonomičeskaja žizn.

(A. Giuriato, Roma.)

159. „Settlemento“ kaj „vando“.

Kion signifas „settlemento“ en numero 122 de ET? Mi devas konfesi, ke mi ne komprenas ĝian signifon, kvankam ĝi havas la formon de la angla vorto, elparolata „Settlement“. En ET n-o 123 estas klarigite, ke ĝi signifas „anglalingve loĝigado“. Angle „settlement“ de homoj estas „kolonio“, kaj la religia sekte en Finnlando ne estas laŭ la angla lingvo „settlement“ — „kolonio“, sed speco de „vizitadoj“ aŭ „loĝado pensione“.

La uzado de „settlemento“ en Esperanto tute ne estas konsilinda, ĉar la vorto ne taŭgas etimologie nek idee. Simile mi volas skribi pri la vorto „vando“.

Mi legis pri la vando de ŝipo kaj vando de ĉambro en ET.

Anglalingve „wand“, Esperantigite „vand“, estas „vergo“ aŭ „bastoneto“, kaj mi ne komprenas ĝian signifon aŭ signifojn en la artikoloj de ET.

Oni ne enkonduku neologismojn, escepte, se ili estas absolute bezonataj.

(E. E. Yelland.)

Rim. de red. Germanoj kutimas uzi „muro“ (germ. „Mauer“) en la senco de „masonaĵo“; tial por ne-masonitaj muroj (lignaj, metalaj) estiĝis la Esp. vorto „vando“ (germ. „Wand“). Tamen la vorto „vando“ ŝajnas nebezona.

Recenzelo.

LIBROJ.

O ESPERANTO NA CAMARA DOS DEPUTADOS, Decembro 1922. — Portugallingva broŝuro 12-paĝa eldono de Brazilo Ligo Esperantista, pri Esperanto en la brazila parlamento.

A BLIND ESPERANTIST'S TRIP to Finland and Sweden, to attend the Fourteenth International Esperanto Congress, and after. By W. Percy Merrick. Havebla de Alfred Jno. Adams, Plympton Terrace, Hastings, Anglujo.

En tiu ĉi 18-paĝa broŝuro la blinda s-ano Merrick anglalingve priskribas sian liberektan vojaĝon al la XIV-a Kongreso en Helsinko, la posivojaĝon al Svedujo, Denujo kaj Germanujo kaj la afablan akcepton, precipe ĉe ĝes-oj Thilander, Blicher kaj Bünnemann. La broŝuro ankaŭ enhavas liston de naciaj konsuloj de la blindaj Esperantistoj kaj noton pri „Esperanta Ligilo“.

ONI RIDAS. De Otto Rieck. Rekomendita de Esp. Lit. Asocio kaj reviziita de Zanoni. 68 pg. Broŝurita. Prezo 1 gmk. × ŝlosilnombro, demandebila ĉe la eldonejo Butin & Jung, Godesberg, Germani.

Sub la moto „Kiu ridas, eliras nallon el sia ĉerko“ s-o Rieck kolektis ĉ. 160 pil-malpil internaciajn kaj pil-malpil draŝajn al naŭvajn spritojn, taŭgajn por esti legataj kaj rerakontataj en Esp. kursor, ĉe grupkunvenoj, dum ekskursoj kaj similia okazoj. La stilo estas flua kaj facile komprenebla ankaŭ por komencantoj, la lingvo bona. Preseraroj enestas nur kelkaj: pg. 36, Sarkasma sciencisto, 8 linio „Peitendorfer“ (anst. Peitenkofer), pg. 57, La balbutulo kaj la ĉevalo, 8 linio (mankas „76“ post „antaŭ“), pg. 65, Sursegmentaj leporoj, 9 linio (mankas klarigo de germana vorto „Kater“ = virkato). Rekomendita de E. L. A. kaj reviziita de Zanoni, la verketo certe kontentigos ĉiun aĉetanton.

(R-ano.)

O ESPERANTO como lingua auxiliar internacional. — Relatorioj prezentadoj pela Secretaria Geral á Terceira Assembléa, emendada e adoptado pela 5-a Comissão da Assembléa a 14 de Setembro de 1922 e adoptado pela Assembléa Geral a 21 do mesmo mez e anno. — 1922. Empr. Inu. Editora „O Norte“ en Rio de Janeiro, Brazil.

Raporto de Ligo de Nacioj pri Esperanto. En portugala lingvo. Kun listo de la grupoj aliĝintaj al Brazilo Ligo Esperantista.

LA KVINJARO DE SOVETLANDOJ. Eldono de Centra Komitato de Sovetlanda Esperantista Unuiĝo, Moskva, B. Dmitrovska 12.

La tre interesa verko enhavas antaŭperolon de E. Drezin, prez. de SEU, artikolon „Jarkvino de la Oktobra Revolucio“ de L. Sosnovski, kun permeso de l' aŭtoro kaj eldonejo „Ruĝa Novo“ tradukitan de V. Polakov, klarigajn notojn, artikolojn pri la centra komitato por likvido de la malsatsekvoj kaj pri SEU, kaj specialan aldonon „Al ĉiuj laboruloj“. Pli ol 70 ilustraĵoj, inter ili arta fotoreproduktaĵo de Lenin, ornamas la libron. La temo estas tendence skribita (kompreneble) sed interese prilaktita: fervora idealismo kaj granda optimismo por la estonteco parolas el ĉi tiuj linioj. La tuta profilo de la eldono (4000 ekz.) estas transdonita al la Turuslanda Komisiono por likvido de la malsatsekvoj. La prezo ne estas montrita.

GVIDILO TRA BIALYSTOK, la naŝk-urbo de nia Maistro. Eldono de „Esperanto Triumfonta“ (T. & H. Jung) Horrem bei Köln, Germ. Prezo 0.30 sviz. fk., malbonvalutuloj 0.30 gmk. × ŝlosilnombro, abonantoj de ET unu ET-numero.

La gvidlibreto enhavas 32 paĝojn da tekstoj pri Bialystok, historiaj dokumentoj, gvidilo kaj anoncoj. Ses ilustraĵoj ornamas ĝin, inter ili la domo, en kiu naskiĝis D-ro Zamenhof, la Reala Lernejo, kie li studis, kaj la Zamenhof-strato.

VORLAUFIGES AUSSTELLER VERZEICHNIS. (Provizora Registro de Ekspozantoj, Printempa Foiro Frankfurt a. M., 15.—21. aprilo 1923.)

En eldonombro de 150 000 ĵus aperis la provizora registro de ekspozantoj por la printempa foiro de Frankfurt a. M. Kun klarigoj en lingvoj germana, angla, franca kaj itala. La grupitoloj estas en lingvoj germana, nederlanda, dana, sveda, norvega, angla, itala, franca, hispana kaj Esperanta. Por ricevi senpaga la registron, interesuloj skribu poŝtkarton al Messant, Esperanto-fako, Frankfurt a. M.

GAZETOJ.

Esperantida. Jan.-febr. Kun aldonoj: Kermen. Dupaĝa duobla numero. Ni rememoras, ke la unuaj numeroj de la Antida gazeto estis 8-paĝaj. Do, konklude laŭ la ege malgrandiĝinta amplekso de la revuo (dupaĝa duobla numero = unupaĝa simpla numero), la „dialekto“ Esperantida konsiderinde maldisvastiĝis. Ni ne komprenas, kial Antido, kiel serioza mondlingvistoj, per propagando por sia ludojo, perdas tempon kaj monon kaj malutilas, per rompo de l' unueco, al la rapida enkondukiĝo de lingvo internacia.

Literatura Mondo, febr. Holanda Esperantisto, 8. 3. Katolika Mondo, marto. Enhavas 3-an komunikon de 3-a Int. Kat. Kongreso en Konstanz, 10.—15. 8. 23.

Arguso, jan.-febr. Ko-Fi-Nu-Ko, febr. La ŝajne ĉina gazeto estas nova Esp. revuo por Korespondado, Filatelio, Numismatiko kaj kolekto, aperanta en Budapeŝt 41, poŝtk. 180.

Itala Esperanta Revuo, febr. Germana Esperantisto, marto. France-Esperanto, marto. Kun interesa gvidartikolo „L' Esperanto au service de l' expansion commerciale française à l' étranger“, de s-o Guérille, eksprez. de la franca kom. ĉambro en London.

Informa Bulteno, n-o 11. L' Etoile Verte (La Verda Stelo), organo de la Mediteranea Esp. Federacio. N-o 1, marto. Adreso: 43, Cours Joseph-Thierry, Marseille. Preskaŭ ekskluzive en franca lingvo. La eldonantoj opinias sian novan gazeton necesa; ni opinias, ke por Francujo sufiĉas unu propaganda organo. Novej Tempojn. N-o 1. Mario Nova prop. gazeto por Norvegiujo. Eldonata de Th. A. Dybing en Stavanger.

Nur en lingvo norvega. The British Esperantist. Mario. Sennacieca Revuo. Mario. La Revuo Orienta. Jan. Kun interesa artikolo „Kvin minutoj kun Einstein“.

Esperanto. Mario. Kun interesa aldonoj „La Informilo“, bulteno por eksierlanda informado pri nacia vivo kaj ekonomio.

Verda Utopio. Dec. 1922. Holanda Esperantisto. 15. 3. L' Esperantista Vivo. 15. 3. Hektografita gazeto de la grupo de Slesian-Dugrée.

Informoj de Esp. Asocio de Estonio. Mario. Hektografita.

DANA AGRIKULTURISTO (mia nevo) 24-jara, serĉas — de 1 majo aŭ poste — okupadon eksterlande, prefere en Anglujo. Posedas plene praktikan kaj teorian scion pri dana terkulturo kaj pri brutara kulturo. Bonegajn rekomendojn de konataj danaj agrikulturistoj li posedas. Anglan kaj germanan lingvojn li lomi scias. Leterojn oni bonvolu sendi al f-ino Astrid Rybo, vicinspektoro, Komuneskonen ved Sirlindholm en København (Dan.) [2]

KIU SAMIDEANO povas informi min pri la nuna adreso de s-o R. Brühl, posedinto de la firma Internacia Fotografita Industrio „Ifo“ en Dresden? Li antaŭe loĝis en Blasewitz, sed nun forveturis al nekonsata de mi loko. Bonvolu skribi al V. Bonde, Stenslund 2 en Falun (Svedujo). [1]

SAMIDEANOJ! Kiu el vi povas min informi pri la sorto de mia amiko Andrei Seur, militkapita estis, kies lasta adreso en marto 1917 estis: Czerak 1. Westpr. Hospitalo No. 2a, barako No. 11a (persona n-o 29696) Germanujo. Skribu al s-o Konst. Kellermann, Massau, en Karlsruhe (Eŝlando). [1]

Korespondado kaj Interŝanĝo.

S-o Franz Kolář en Steyr (Aŭstrujo), Wieserfeldpl. 32, deziras korespondi per pk. kaj let. kun ĉiulandanoj. [2]

S-o Koloman Martinovits, ferkomercisto (Martinovits-cég, Bányányi-tér) en Odorhei-Szekelyudvarhely (Rumanujo, Transilv.), interŝanĝas pm. kun ĉiulando, nur rekomendite. Ne sendas unue. [2]

S-o Julio Szabó en Odorhei-Szekelyudvarhely (Rumanujo, Transilv.), sir Principesa Elisabeta 18, interŝanĝas pk. il. bñ. kaj pm. (100—200 en rekomendita letero) kun ĉiulandoj. [2]

F-ino Irena Koniczna en Inowrocław (Polujo) Zbychora 4, volas korespondi per pk. il.; interesigas ankaŭ je pm. kaj papermonoj. [2]

Ruslandanoj! Juna ĉeĥa fraŭlo, kiu intencas pli poste forvojaĝi al Rusujo, serĉas korespondadon kun Ruslandanoj. Skribu al Josef Švarc en Gladbeck i. W. (Germ.), Rosshaidestr. 66. [2]

S-o R. Horrisland, fervojisto, Jernbanest. en Kristiansand (Norv.), deziras korespondi kun fervojistoj kaj interŝanĝas pm. prefere kun ekstereŭropanoj. [2]

F-ino Elizabeto Brennwasser (16-jara) deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj. Masaryksir. 63, en Priešov (Ĉeĥoslovakujo). [2]

Eduard Friedmann en Priešov (Ĉeĥoslov.) Dolná okr. 40, (23-jara) deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj, prefere kun fraŭlinoj. [2]

Por 3 dolaroj aŭ mono en egala valoro ni sendas ĉiujn kurantajn poŝtkartojn de la liberŝtato Danzig, aŭ ankaŭ ĉiujn deziratajn markojn de Germanujo. — W. Schubring en Berlin-Neukölln, Friedelsir. 13, i. [2]

Miregon kaŭzas la verketo ĝis nun nepresita Knaboj aŭ knabinoj? Laŭ la volo de la gepatroj. Ĝi pravas la eblecon de laŭvola sekse destino, bazita je la rezultato de sciencaj esploroj. Distingitaj, facile kompreneblaj gravaj klarigoj por ĉi klerulo, same grava ankaŭ por beshredistoj kaj ekonomoj. Tuj havebla kontraŭ antaŭpago de 1 sv. fk. al egalvaloron. Malbonvalutuloj demandu prezon ĉe la liveranto: P. Kuifer, Zittau i. Sa. (Germ.) Rosenstr. 5 B. m.

ALBANIO

Broŝurforma represo de interesa artikolo el „Internacia Komercio“ n-o 1. 16 paĝoj, kun du ilustraĵoj.

PREZO:

bonvalutuloj 0.30 sviz. fk., malbonvalutuloj 0.30 gmk. × ŝlosilnombro, ET-abonantoj la prezo de unu ET-numero (pagon ni prenos laŭdire de la abonanto).

Eldonejo „Esperanto Triumfonta“ (T. & H. Jung), Horrem b. Köln.

Ni liveras nur librojn de ni mem eldonitajn. Pro aliaj verkoj sin turni al Butin & Jung en Godesberg, Germ.

La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof

Inda memorlibro, presita sur luksa papero, kun multaj ilustraĵoj laŭ originalaj fotoj. Nepre havinda komplemento al la libro de D-ro Privat: La vivo de Zamenhof.

Taglibro de Vilaĝpedelo

Interesa romansimila rakonto de la dana verkisto Blicher. Tradukita de s-ano Bulhuis, LK-ano. Rekomendita de ELA.

Oni ridas

Bela kolekto de veraĵoj de bonhumoro kaj spirito. De s-ano Rieck. Rekomendita de ELA kaj reviziita de Zanoni, literatura redaktoro de ET.

Demandu la aktualan prezon ĉe

Butin & Jung, Godesberg (Germanujo) Esperanto-eldonejo, Bahnhofstr. 30 Poŝtĉeka konto Köln 920 36.

Ornamajproduktanto serĉas KOMERCAN RILATON

kun importistoj kaj vendistoj de GABLONZ'AJ ARTIKLOJ.

Rudolf Lang, -:- Schmuckwaren, Gablons a. N., Augasse 6, (Ĉeĥoslovakujo).

Importo.

Eksporto.

Pollanda Komerca Agentejo

Adolfo Oberrotman, Varsovio Krak-Przedm. 10

deziras ligi komercajn rilatojn kun gravaj eksterlandaj firmoj, speciale en teknikaj maŝinoj, manufakturo kaj galanteriaj artikloj; donas ĉiujn informojn pri la polaj komerclokoj. :-

Nur pograndaĵoj firmoj bonvolu sendi ofertojn kun specimenoj aŭ katalogo.

Reprezentado.

Perado.

S-o J. B. C. de Koster, 98, Daltonstraat en 's Gravenhage (Nederl.) deziras interŝanĝi pm. kaj fotografatojn kun ĉiulandoj. [2]

S-o Emil Malinen en Viipuri, Hiekkä Peltostr. 4, (Finnl.) deziras korespondi per pk. il. kun ĉiulandoj. [3]

Lennart Lundell, kontoristo, Åbo 1, en Malmö 7 (Sved.) deziras interŝanĝi il. pk. kaj amatorfotojn kun ĉiulandoj. [3]

Mi deziras korespondi kun Esperantistoj de la tuta mondo kaj ricevi gazetojn en nacia aŭ internacia lingvo. Skribu al D-ro Vito de Benedetto en Lecce (Sud-Italujo) [3]

Atentu! Mi ŝanĝas pm. de Danzig, Memel, Litovujo, Litovujo, Polujo, Ruslando, litovajn kun surŝtampo de Memel, kontraŭ papermonoj. Bonvalutuloj pagas 30 dolarojn anst. 30 laŭ katalogo. Mi ne sendas unue. Aldonu respondkuponon, E. Klotz, Kaplanstr. 5 en Königsberg i. Pr. (Germ.). [1]

Fraŭlo Deziderio Racsmány, Czobor u. 124 en Budapeŝt VII (Hung.) deziras korespondi per letero kaj poŝtkarto kun tutmondo. [1]

Fraŭlo Josef Kirsch, Ring 26 kaj fraŭlo Josef Bergmann, Ring 60, ambaŭ en Arnau (Ĉeĥoslov.) deziras korespondi kun ĝelunuloj el la tuta mondo (krom Germ. kaj Aŭstr.) per il. pk.; interŝanĝas ankaŭ pm. [1]

S-o C. L. Clarke, 60 Euston Road en Oakleigh, Victoria (Aŭstralujo) interŝanĝas Aŭstralajn pm. por fremdlandaj. Speciale li deziras ricevi pm. el Okcidentaj Hindaj Insuloj. [1]

S-o W. Kučerenko en Tighina, Besarabio (Rumanujo) interŝanĝas pm. kun seriozaj kolektantoj laŭ katalogo aŭ mankolistoj. Sendas (ne unue) rusajn, rumanojn kaj ukrainajn. [1]

S-o Petar Lavrov, Crikvenica, Hrv. Primorje, Ruski odbor, (Jugosl.) deziras interŝanĝi pm. kun ĉiulandoj, havas belajn malnovajn. [1]

F. Neumann, en Emmerich a. Rh. (Germ.) Beckseherweg 15, deziras interŝanĝi pm., 50—100 el ĉiulandoj, kaj korespondi kun tuta mondo per leteroj kaj il. pk. [1]

Desidero Feldmann, aspiranta epokekisto deziras korespondi kun ĉiulandoj, pri ĉiuj temoj. Adr.: Szebeni ut 20 en Priešov (Ĉeĥosl.). [1]

Walter Schimek en Trautenu (Ĉeĥosl.) Feldgasse 8, deziras korespondi per il. pk., leteroj kaj interŝanĝas pm., papermonoj, gazetojn kun la tuta mondo. [1]

Rudolf Pivl, ĉefdel. de la Universala Esperanto Asocio ĵurnalara por Ĉeĥoslovakujo en Trautenu deziras interŝanĝi pm. pk., kaj gazetojn. Korespondas pri ĉiu temo germane, france kaj Esperante. [1]

Kiu sendas al mi oficialajn pk. (kun presita marko) de sia lando, ricevos tiujn de Germanujo aŭ il. pk. Por 50—100 div. pm. mi sendas samkvanton da germanaj K. Köhler en Essen (Ruhr), Schäferstr. 29 II. [1]



Serca dramo de fama hungara humoristo Frederiko Karinty: „Morgaŭ matene“

estas aperanta kaj estos plimultekosta post la apero! Bele karlonita! Proks. 160 paĝoj. Formato 16:12 cm. Provizoral prezo: Por bonvalutuloj 1 sv. fk.; por mezbonvalutuloj 0.70 sv. fk., afankite; por malbonvalutuloj 260 hung. kronoj plus 20 % sendkosto al egalvaloron. Por revendistoj 0.70 sv. fk. kun 20% da rabato.

Antaŭsendu monon kaj mendo ĉe Hungara Esp.-Instituto en Budapeŝt VI, Eötvös ut 3.

Granda novaĵo!

Elektra suno!

Plej oportuna varmiforno, pura, agrabia, ĉiam preta!

Vendado per Esperanto Komercista Grupo, Dresden-N., Hauptstrasse 38.

„Speton“—gard-rimedo, grava por virinoj! Tavol-eto Mk 100 + sendkosto.

LUKSA-PANO FABRIKOJ

ANTAŬE HENRI J CARELS.

50 BUTIKOJ: DEN HAAG, HAARLEM, AMSTERDAM.	LUNĈEJO CARELS (ĈEFO: H. A. SCHAR- WÄCHTER.)	DEN HAAG, 68 WEIMAR- STRAAT. ONI PARO- LAS ESPER- ANTON.
--	--	---

Abonejoj de ET

en la landoj

Aŭstrio: Ferd. P. Huber, Münchberg 5, Salzburg; por Wien: „La Esperantisto“ (d-ro E. Pfeffer), Wien I/1, Postamt 34.
Belgio: Frans Schoofs, 44, Kl. Beersstraat, Antwerpen. Poŝtĉeka n-o 28430.
Brazilo: Brazilo Ligo Esperantista, Proks. 16 de novembro, Rio de Janeiro.
Bulgario: Georgi Hrn. Golevski, Bul. Marie Luiza 48, Sofia.
Ĉeĥoslovakio: Otto Sileňák, Hradec Králové. Otto Lumpe, Trautenuau.
Estonio: Est. Esp. Unuiĝo, poŝtkas. 6, Tallinn.
Finna: O.Y. Movado A.B., Kasarminkatu 3, Helsinki.
France: Esp. Centra Librejo, 81 rue de Clichy, Paris 9.
Hungaro: Páló Balkányi, Hajos-utca 15-II-2, Budapeŝt VI.
Italio: Itala Esperantista Federacio, Casella Postale 20, Verona.
Japano: Moriozo Ka, 16-V, Kitamagari, Aojama, Tokio.
Jugoslavio: D-ro Dušan Maruŝ, Zagreb, Jezuitska ul., br. 1.
Latvio: Tālvaldis Indra, Rīga, Pasa kaste 475.
Litovo: P. Medem, Smellu g-vte 12, Kaŭnas (Kovno).
Polio: Adolfo Oberrotman, Krak.-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 3126).
— Pola Esp. Servo (Pr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.
Rumanio: Esp. Centru Rumana, Bucureŝti, Alina Suter, 19.
Ruso: Mikaelo Valentinov, sekretario de Centra Komitato de S. E. U., Moskvo, poŝtkas. n-o 650.
Svedo: Förläggareföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1.
Svicio: Esp. Librejo „Verda Stelo“, Rosenheimstr. 5, St. Gallen-Ost.
U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, Box 28, Washawken N.

Gino Sodini, Via della Vigna Nuova No. 1 en Firenze 4 (Ital.) deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiulandoj. [1]

S-o G. Haršev, str. Gurguliat 19 en Sofia (Bulg.) deziras korespondi per il. pk. kaj leteroj, interŝanĝas pm. [1]

D-ro Julio Eŝkaŭriaza, Prolongación de la Gran Via en Bilbao (Hispan.) deziras korespondadon kun baliaj samideinoj pri ĉasdemandoj. [1]

Fraŭlo Josef Salom Nadal, camlino vecinal de Montaña 82, en Pla de na Teza, (Hispan. Mallorca) deziras korespondi kun gesamideanoj de tuta mondo per il. pk. kaj interŝanĝi portretojn. [1]

Gekursanoj volas korespondi kun ĉiulandaj samideanoj. Adr.: J. Vilutis, en Domava (Litovujo) Ukio Mokytka. (2) Alfons Rörzschke en Trautenuau (Ĉeĥosl.) deziras interŝanĝi papermonojn, poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn kun aliaj landoj. [1]

S-o Rafaelo Herrero en Mar del Plata, str. San Martín 2532 (Argentino) deziras interŝanĝi il. pk. (bñ.) kaj leterojn. [1]

Latocha Jozef en Szumbark 6, P. Dolní Bludovice, Slezsko (Ĉeĥoslov.) deziras korespondi pri diversaj temoj kun ĉiulandoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn vidajkartojn kaj Esperantojn (ankaŭ kun fraŭlinoj). [1]

Por pliperfektiĝi en angla lingvo juna viro deziras interŝanĝi pk. laŭeble kun angliano. Karl Gallab en Wien XIV, Braunhirschengasse 38.

Mi deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj kun ĉiulandoj. Thea Bleicher en Wien II, Volkswehrplatz 19. [1]

F-ino Gena Djankova, str. Targoveko en Tirnovo (Bulg.) deziras korespondadi per il. pk. [1]

Knaboj lernantaj Esperanton en Publika Lernejo de Bilbao deziras korespondi kun aliĝintaj knaboj. Adreso: Escuelas de Berastegui en Bilbao (Hispan.) [2]

D-ro Julio Eŝkaŭriaza, Prolongación de la Gran Via en Bilbao (Hispan.) deziras korespondadon pri beletristiko kun samideanoj de baliaj landoj, Ruslando, Hindujo, Ĉinujo kaj Japanujo. [1]

S-o Stellan Danilevskov en Tirnovo (Bulg.) deziras korespondadi per il. pk. [1]

Bazilo Averin, en Astrahani, (Rusl.) Poŝtkesto 14, interŝanĝas poŝtmarkojn, papermonojn ktp. Viajn leterojn paku forlike! Sendu (rekomendite) poŝtmarkalibumojn kaj katalogojn (precipe novajn) kaj skribu kiom da sovjetaj pm. al vi sendi. [4]

D-ro Julio Eŝkaŭriaza, Prolongación de la Gran Via en Bilbao (Hispan.) deziras korespondadon kun nehispantaj samideanoj. [1]

S-o Fiori Giuseppe, Via Breda Dell'Acqua 16, en Mantova (Ital.) deziras korespondi poŝtkarte kaj letere kun ĉiulandaj gesamideanoj pri Esp. kaj laborista movado; interŝanĝas fotografatojn, vidajkartojn, Esp. nacian revuon ktp. [1]

Pri la gazetara demando kaj la aktualigo de ET.

Libera rimarko al la artikoloj pri nia gazetaro!

I. Por la naciaj gazetoj.

Permesu aldoni al tiu temo lasttempe ofte pri-traktita mian opinion laŭ miaj personaj spertoj. Preskaŭ ĉiuj opinias, ke la nacilingvaj Esp. gazetoj aŭ la naciaj Esp. lingvaj gazetoj ne estas necesaj kaj oni anstataŭigu ilin per flugfolioj kaj propagandiloj.

Oni eĉ proponas, ke ĉiu Esperantisto nur last-vice abonu la nacian gazeton.

La hungarlanda situacio instruas alion. Kvan-kam mi ankaŭ diras, ke ĉiu konscia Esperant-isto estas membro de UEA kaj abonas „Esp. Triumfontan“ kaj nun jam ankaŭ „Literaturan Mondon“, kiel solan grandan literaturan gazeton, mi ne povas konsili flankenlasi la naciajn gazet-etojn.

La fakto, ke el la dekmiloj da Esperantistoj la gazetojn „Esperanto“ kaj „Esperanto Triumfonta“ abonas kaj legas nur proksimume 6000, montras, ke la aliaj Esperantistoj almenaŭ parte legas la naciajn gazetojn.

Efektive — bedaŭrinde — ekzemple en Hungarlando eĉ ne ĉiu deka Esperantisto abonas aŭ aĉetas ET kaj estas membro de UEA. Ili ne estas konsciaj Esperantistoj, oni respondos. Laŭ mia supra aserto vere ili ne atingis la konscion ankoraŭ, ke centra organizo kaj centra organo estas ĉiamaniere subtenindaj. Sed ili tamen legas la nacian gazeton! La kaŭzo estas ankaŭ ekonomia. La nacia gazeteto kostas por tuta jaro tiom, kiom 5 numeroj de ET aŭ helpmembrec de UEA. Do estas pli profita por tiuj, kiuj ne povas aŭ volas doni multon por Esperanto, aboni la nacian gazeton.

Ni ĝojas, kiam ni atingis, ke la nacia gazeto, la „Hungara Esperantisto“, aperas nur Esperante. Ni rimarkis, ke hungarlingvajn artikolojn propagandajn ne bezonas jam tiuj, kiuj legas la nacian Esp. gazeton, ili jam estas Esperantistoj. Nacilingvaj artikoloj kaj sciigoj aperu en la nacilingvaj grandaj gazetoj por ne-Esperantistoj.

Tamen la Esperanta teksto donas okazon al tiuj, kiuj nenion alian legas, almenaŭ foje monate legi Esperante kaj samtempe sciiĝi pri landaj okazintaĵoj: kunvenoj, festoj, kongresoj, estontaj programoj, kiujn detale ne povas komuniki ET aŭ „Esperanto“ de UEA kaj kiujn hungare detale ne komunikas la nacia gazeto.

En kelkaj urbestoj kaj vilaĝoj por izola Esperantisto estas la sola ligilo kaj sciigilo la nacia gazeteto, kiu kuntenas tiun kaj retenas lin aŭ ŝin ĉe la movado.

Anstataŭ tion per flugfolioj ne estas eble. La proponitaj nacilingvaj propagandiloj estas ankaŭ necesaj, se estas mono kaj laborantoj por dissendado. Sed tiujn jam bezonas aliaj legantoj, ne la Esperantistoj. Ekzemple oni eldonis hungare lastjare la manifeston de instruistoj kaj dissendis ĝin al la lernejoj. Se estus mono kaj laborantaj homoj sufiĉaj, oni povus ian flugfolion ĉiunmonate verki, eldoni kaj dissendi. Sed tio estus pli malfacila laboro, ol funkciigi malgrandan gazeton kaj sendi ĝin al samaj adresoj.

La nacilingvaj ĵurnaloj povas, precipe en urbestoj, transpreni la rolon de informanto kaj enhavi tiajn pri-Esperantajn sciigojn. La Esperantaj naciaj gazetoj devas ligi tiujn milojn, kiuj ankoraŭ ne estas ligitaj per la grandaj Esp. gazetoj kaj organizoj! Do ilia tasko estas grava kaj malfacila.

La nacilingvaj ĵurnaloj povas ligi eble sam-urbanon eldonante angulojn Esperantlingvajn por la loka grupo, kiel okazas en Szombathely, sed la sama ne estas ebla por tuta lando, ĉar la jam okazintaj provoj montris, ke oni ne povas akiri ĉe Esperantistoj la legadon de sama nacilingva ĵurnalo.

En bonvalutaj landoj eble ne kostas malpli la nacia gazeto ol la internacia, do tie oni povas klopodi, ke la sciigoj de la naciaj grupoj aperu en la internacia gazeto kaj la membroj abonu tiuj nur la internacian, kvankam ĉie oni bezonus insituan landan organon.

Sed en aliaj landoj oni bezonas la naciajn. La „Germana Esperantisto“ ekzemple bonege funkcias kaj donas bonajn planojn por organiza landa laboro instruante pri lingvo, instruado, grupvivo, ekzamenoj kaj aliaj necesaj laboroj. Tiuj laŭloke estas pli gravaj, ol ĝeneralaj mal-longaj sciigoj de la internaciaj gazetoj. Ja UEA raportas en „Esperanto“ nur la plej gravajn okazintaĵojn.

La propagandistoj bezonas scii ankaŭ la pli malgravajn. Kaj la novaj Esperantistoj, kiuj ankoraŭ ne legas la internaciajn gazetojn, — sed ankaŭ multaj malnovaj — lernas aŭ devas lerni el la naciaj Esp. gazetoj ion el la estinteco de Esperanto, pri la sukcesoj kaj pri pruvoj de taŭgeco, pri la konkurantoj ne danĝeraj, pri respondoj al plej oftaj kontraŭargumentoj ktp.

Mi konstatis, ke gvidantoj de provincaj movadoj ne estis informitaj pri aferoj, sukcesoj, kongresoj, argumentoj, kiujn ili estus povintaj kaj devintaj uzi, kaj ofte i.i. eksciis tiujn per la nacia

gazeteto! La naciajn gazetetojn oni devas do subteni kaj atingi, ke ĉiu membro de la naciaj societoj ricevu ilin. Per tio la nacia societo ne bezonas aparte inviti la membrojn al gravaj aferoj, sed komunikas laŭ metodo de Germ. Esp. Asocio ĉion oficialan en la oficiala gazeto nacia.

Se oni serioze volas, ĉiu Esperantisto povas krom la nacia gazeteto ankoraŭ aliĝi al UEA kaj aboni ET kaj Literaturan Mondon kaj eble fakte gazeton laŭ volo (medicinan, laboristan, kato-likan, policistan ktp.). Kiu abonas la nacian gazeton kaj ne abonas la internacian, verŝajne ne abonos ĝin eĉ tiam, se la nacia ĉesos. Cetere multaj samideanoj abonas kaj aĉetas Esperantajn nur se iu altrude ŝovas ĝin antaŭ la okulojn! Multaj elspezas por sensencaĵoj pli faci'e, ol por Esperanto! —

II. Por la internaciaj gazetoj.

Malfacila problemo, ĉar ja ili devas servi por ĉiuj! En unu gazeto ne estas facile kunigebla ĉiu fako, tion la plej ampleksa kaj plej riĉa naci-lingva ĵurnalo ne povis atingi. Kuracistoj ĉiam pli fidos al aparta medicina revuo ol al aldono medicina ĉe granda gazeto. Simila metodo, kiel ĉe la mondmagazenoj de urbejoj: kiu volas ion bone elekti, iras al la faka vendejo kaj ne en la fakan sektion de la mondmagazeno. Tio estas fakto ofta — se eble ne ĉiam pravigebla.

Do por disvastigo de nia lingvo nepre devos esti apartaj gazetoj por fakoj sciencaj, por komercistoj, policistoj, por laboristoj, por arto kaj literaturo. Ĉar kelkaj tiaj fakaj gazetoj jam ekzistas, espereble ili jam povos resti kaj ne devos ĉesi. Ilia nuna enhavo jam nun estas pli abunda, ol povos esti en la ĝeneralaj internaciaj gazetoj. Kompreneble tio ne malhelpas, ke por fakoj ne sufiĉe fortaĵ aperu aldono en ET. Tamen se ekzemple la komercista fako estos sufiĉe forta, la komerca revuo devos ankaŭ memstare aperi, ne nur kiel aldono. —

La internaciaj gazetoj, kiel „Esperanto Triumfonta“ kaj „Esperanto“ havas alian celon:

La celojn oni jam priskribis bonege en diversaj artikoloj. Lastfoje s-ano Hevesi donis bonegan konsilon. El tiuj diversaj oni devas kunigi kaj sumigi ĉion:

1. Akiri sciigojn interesajn por ĉiu kultur-homo en ĉiu mondparto ne nur laŭ Esperantista vidpunkto kaj atingi per tio, ke ankaŭ ne-Esperantistoj interesiĝu pri la enhavo kaj klopodu atingi ĝin. Jen praktika sukcesigo de Esperanto. Kulturo, scienco, ekonomio, sporto, literaturo, politiko ktp. havu lokon, sed ne laŭ detaloj, sed laŭ novaj faktoj kaj okazintaĵoj. Detaloj, pri tio jam aperis en antaŭaj artikoloj.

2. Havigi al la Esperantistaro fidindajn raportojn pri lastaj sukcesoj kaj okazintaĵoj en mondlingva movado. Tio estas, kvankam por multaj ne interesa kaj nenecesa, ires grava. El ET prenas la propagandajn sciigojn la naciaj Esp. gazetoj, la naciaj Esp. societoj kaj propa-gandistoj por ĵurnaloj kaj paroladoj nacilingvaj. Porlasi ilin estus peko!

Mi spertis, ke ni bezonegas tiujn sciigojn kaj ofte estis bonega propagando, kiam ankoraŭ ET aperis tiamaniere, ke sur la unua paĝo supre estis per grandegaj literoj presita la lasta sukceso de Esperanto. Oni bezonas ankaŭ pri Esp. diskutojn pri celoj, organizo ktp. de la movado. La kongresoj estas tro mallongaj por tio, kaj ne ĉiuj havas okazon tie diri siajn opiniojn.

Mi ankaŭ spertis, ke ofte eĉ malnova samideano bezonis kuraĝigilon kaj ricevis emon denove labori legante pri novaj sukcesoj alilandaj. Granda amaso ne bezonas ilin, sed por la gvidantoj de propagando, por dubemuloj, por tiuj, kiuj malfortigas kaj ŝanceliĝas por tute novaj kaj nes-pertaj, estas ofte gravaj la propagandaj artikoloj, la opinioj de alilandanoj, la novaj sukcesoj. Eble ET — kiel jam faris „Esperanto“ de UEA, povus apartigi iam tiujn nur-Esperantajn sciigojn sub rubriko alia („propagando“ aŭ „Mondlingva Movado“) kaj unuloke publikigi la aferojn priskribitajn.

Fine en tiu rubriko povus aperi la sciigoj de UEA kaj la nun multkosta aparta bonega ga-zeto de UEA ne estus plu necesa, ĉar ĉiuj aliaj ĝiaj artikoloj trovus lokon en ET, kiun UEA-membroj laŭ aparta interkonsento ricevus pli malkare. Tiamaniere ET kaj UEA helpus unu la alian, kaj la kotizo de UEA estus pli malalta — sen deflito pro la nuna gazeto!

Progreso, pacamo kaj toleremo estu nia devizo ĉe la gazetoj! Ĉiu trovu la sian! Esper-eble tiuj multaj diskutoj gvidos nin al gazetaro taŭga por la nuna miksaĵo de Esperantistoj, por ĉiuj partioj kaj por tiuj, kiuj ricevos parte per nia gazetaro emon fariĝi kunbatalantoj de nia ideo.

Esperanto ĝis nun sukcesis, ĉar ĝi enhavis apud la praktikeco la idealismon. Oni ne klopodu disigi tiujn! Ili ne estas kontraŭuloj, ili estas fratoj helpante unu la alian! Tiel restu!

Paŭlo Balkányi, Budapest.



Aktualigi nian semajnan gazeton!

La artikolo de s-o Endre Hevesi (n-o 124 de ET) certe enhavas multajn tre atentindajn ideojn. Tamen, ne ĉiuj estas efektivegeblaj laŭ praktika vidpunkto. Ekzemple li demandas: „Kial ET ne havis lokan raportiston en Lausanne, dum la Konferenco?“

Nu, mi partoprenis la Lausanne-an Kon-ferencon por Paco en Oriento kiel speciala sendito de konata Telegrafa Agentejo.

Kiel kunlaboranto de ET facile mi povis skribi raportojn por ET, sed...

La ĵurnalista aparato funkcianta dum ĉiu grava konferenco estas kutime tiel zorge organizata, ke semajna gazeto ne povas profiti el regula raportado. La prikonferenca informado de la internacia ĵurnalaro okazas telegrafe aŭ tele-fone kaj preskaŭ ĉiuhore. Jen ekzemplo: Kiam la rompo de la konferenco okazis en Lausanne, vespere unu kvaronon antaŭ la oka horo, la gazetoj en Zürich, Basel, Genève ktp. jam dis-konigis tiun novaĵon je la 10-a horo samvespere kaj, rilate al la internacia gazetaro, la eldonoj de la sekvanta mateno aŭ tagmezo jam enhavis ĉiujn eblajn detalojn! Telegrafo kaj telefono funkcis seninterrompe kaj la ĵurnalistoj senlace servis al la gazetaro tra la tuta mondo: en Lausanne ja ĉe-estis pli ol 200 ĵurnalistoj el ĉiuj terpartoj! Kaj la grandaj agentejoj Reuter (angla), Havas (franca), Wolff (germana), Stefani (itala) ktp. zorgas por rapidega kaj tre detala raportado tra ĉiuj landoj. Laŭ tiuj informoj la internacia gazetaro mem kun-metas proprajn kritikojn kaj ĉefartikolojn — por kio ĝi ne bezonas Esperantistan helpon! Tial ET kaj mi rezignis publikigi artikolojn pri la konferenco de Lausanne.

Alla afero estas tiu de „intervjuoj“. ET jam faris eksperimenton (vidu ET n-o 104, „Inter-vjuo kun s-o Chao-Hsin-Chu“, kaj n-o 113 „La Nigra Misiono ĉe la L. d. N.“) kaj daŭrigos tiun metodon de informado.

Tre prave s-o Hevesi fine konstatas: „Oni devas eduki Esperantistajn ĵurnalistojn“. Estas vere tre bedaŭrinda fakto, ke la Esperanta gazetaro ankoraŭ tro havas la aspekton de dile-t-anteco. Kvar inter kvin redaktoroj de Esperantaj gazet(et)oj nenion scias pri la fundamentaj reguloj de ĵurnalismo. Ili „redaktas“ ja laŭ sia plej bona povo, sed sen sana plano. Ĉu oni povas „eduki“ ilin?

Preskaŭ mi dubas. Jam tro oni skribis kaj predikis pri necesa reformo de nia gazetaro. Eble helpas la prudento de la Esperantistaro mem: oni ne abonu, oni ne subtenu gazeton, kiu ne estas absolute necesa, kies programo ne estas klara aŭ kies ĵurnalista (teknika) arango ne respondas al ĝe-ne-rala kulturo. Bojkoto, en tiu senco, ŝajnas la plej bona „edukilo“.

Hj. Unger, Lausanne.

Pri aktualigo...

Kun granda plezuro mi tralegis en ET n-o 124 la artikolon de s-o Endre Hevesi. Mi ĝojas, ke ankaŭ en aliaj anguletoj de mondo troviĝas per-sonoj, kiuj havas la saman opinion. Efektive, se ni ĉirkaŭrigardus la tutan agadon de Esper-antistoj, ni povus trovi multajn tiajn flankojn, kiuj ne povas doni konvenan lokon por internacia lingvo en la interrilatoj de diversaj nacioj, ŝtatoj ktp.

Mi opinias, ke nia internacia lingvo jam tra-vivis sian unuan Junecon, dum kiu ĝi bezonis varlistinojn, lulilojn, amuzilojn, dorlotadojn, karesojn kaj enluligojn. Kompreneble, dum la unua Juneco oni bezonis nek politikajn nek aliajn aktualizaĵojn, ĉar por tia aĝo okupiĝi je politiko aŭ simila aktualizaĵo estis iomete danĝera, laŭ ĝenerala opinio de la edukistoj. Sed nuntempe, kiam internacia lingvo estas jam maturiĝinta, kiam ĝi plu ne bezonas longajn pruvojn pri la taŭgeco por ĉiu-taga vivo, la Esperantistoj devus uzi sian lingvon por diversaj aferoj. Ni devas jam diri, ke sufiĉas por ni nur „Esperante“ amuzigi sin, ĉar nia lingvo estas kreita ne por amuzoj nur, sed por diversaj interrilatoj de diverslingvaj homoj, kiuj bezonas unu neŭtralan lingvon.

Trarigardante la plimulton de niaj Esp. ĵurnaloj aŭ gazetoj, ni rimarkas, ke preskaŭ ĉiuj direktas sian plej grandan atenton al artikoloj pri Esp. movado. Eĉ „Esperanto Triumfonta“ ne estas asekurita je tiaspecaj pekoj. Tial oni ricevas la impreson, ke Esperanto estas la sporto aŭ amuz-ilo, kiu nobligas la homan vivon. Vi prenu iun Esperantistan gazeton, kaj vi mem konvinkigos, ke dediĉata loko por la artikoloj kun diversaj Esp. sciigoj estas tute vana afero. Kompreneble, oni povas iomete priskribi pri okazintaj kunvenoj de Esperantistoj, sed tio ne devas okupi tro grandan lokon rilate al la tuta materialo de l' gazetaro.

Nia socia, arta, politika vivo estas tiom larĝa, ke pri ĝi oni povus havi ĉiam neelĉerpeblan materialon. Eraras tiuj, kiuj pensas, ke pri tiaj aferoj oni povas nur trakti en nacilingvaj gazetoj, ĉar Esp. gazeto, laŭ ilia opinio, devas esti neŭtrala. Sed mi neŭtralecon komprenas en alia senco, kaj

neniam konsentos, ke Esperanto konservu tian strangan „neŭtralecon“, sekve de kiu jam multaj personoj, kiuj estis ellernintaj Esperanton, ĉesis labori por niaj komunaj celoj, kondukantaj al realigo de nia idealo.

Kiuj scias francan aŭ anglan aŭ germanan lingvon, tiuj nuntempe iel povas vivi sen vera internacia lingvo, ĉar tiuj ĉi lingvoj iomete havas internacian karakteron. Sed por alilingvuloj la neekzisto de internacia lingvo estas granda mal-oportunajo, ĉar ili neniel povas interrilati kun alilanduloj. Pro tio oni povas iomete klarigi, kial, ekzemple, sciantaj francan aŭ anglan lingvon konsideras Esperanton kiel amuzilon. Kompren-eble, ne ĉiuj tiel opinias, kaj ne nur francoj aŭ angloj tiel opinias, sed plej ofte la civitanoj de aliaj landoj, kiuj estas ellernintaj francan aŭ anglan lingvon.

Se ni povus, ekzemple, per internacia publi-cistika literaturo montri al ĉiuj skeptikuloj kaj kontraŭuloj de Esperanto, ke por simila kampo estas tre taŭga kaj oportuna internacia lingvo, — tiam ni povus tuj almalliti por nia influo la tutan mondon. Ne pensu, ke en ĉiuj landoj la legantoj de nacilingvaj gazetoj estas bone informataj pri diversaj okazintaĵoj en aliaj landoj. Kaj ne timu, se okeziĝintaj priskribata en Esp. gazeto estas iomete tendenco, — tio ne malhelpas por ekkoni la veran situacion aŭ staton de priskribata afero. Oni devas ĉiam memori, ke tiaj „tendencoj“ ĉiam estas ankaŭ en nacilingvaj gazetoj, eĉ pli grandaj. Ankaŭ ni devus alkulmigi, ke la respondecon je priskribata afero ĉiam prenas sur sin ne redak-toro de gazeto, sed la aŭtoro, tiam ni povus eviti la riproĉojn, metatajn al redaktoro de gazeto.

Socia, politika, arta, ekonomia vivo — jen la temoj por Esp. gazeto. Se, ekzemple, „Esperanto Triumfonta“ fariĝus tia gazeto, tiam ĝi servus kiel fonto por multaj nacilingvaj gazetoj, kiuj tre volonte transprenus artikolojn el Esp. gazeto. Sed jam tiu fakto estus plej bona defendanto kaj prop-agandanto de nia internacia lingvo. Se vi ne kredas tion, — provu, kaj vi konvinkigos!

A. Klimas, Kaunas.

Pri la aktualigo de nia semajna gazeto.

Pravege montras al ni s-o Endre Hevesi, ke aktualigi nian semajnan gazeton estas necese. Tamen ŝajnas al ni, ke la montrita vojo estas tre danĝera. Tro mi ŝatas nian ET, kaj tro ĝi estas necesa por la movado Esperantista, por ke ni risku ĝian ekzistadon per tia eksperimento, kia estas la prilaktado de politikaj problemoj en la gazeto.

Certe, s-o H. nur konsilas prilakti temojn de ĝenerala intereso. Kompreneble oni devas eviti ĉion, kio povus esti konsiderata de certaj legantoj de ET kiel ne tute senpartia. Sed jam nun oni povas antaŭvidi, ke estus tro malfacile por la redaktoro decidi, ĉu iu artikolo estas sufiĉe sen-partia por ke oni ĝin sentime povu publikigi. Ofte oni ja trovas en naciaj gazetoj akrajn disputojn pri iu opinio, kvankam ĉiu gazeto ĝene-rale estas legata de homoj apartenantaj al la sama nacio kiel ankaŭ al la sama socia grupo. Sed pripensu, ET estas legata de homoj divers-naciaj same kiel ankaŭ diverssociaj.

Ĉu s-o H. serioze kredas, ke estas eble trovi temon politikan, kiu ne tuj igus akran disputon? Mi persone estas konvinkita, ke la plej objek-tiva artikolo kaŭzus malpacon.

Ni Esperantistoj ja estas idealistoj; ni nepre evitus ĉion, kio povus rompi nian tutmondan harmonion, certe ni prilaktadus tute trankvile ĉiujn temojn serĉante veron. Certe ni tiel agus, se... se ni sufiĉe estus idealistoj. Troviĝas en nia movado ja sufiĉe da seriozoj idealistoj, sed mi estas konvinkita, ke tamen estus tro malfacile kontentigi ĉiujn. Kiu ne jam spertis, ke ofte eĉ inter tri homoj estas tri diversaj opinioj kaj ke ne estas eble interkonsenti! Tio rilatas precipe al temoj politikaj.

Mi do ripetas: evitu ni ĉion politikant!

Pri aferoj politikaj informiĝu ĉiu per sia nacia gazeto. Nia Esp. movado liveras sufiĉe da mate-rialo por nia ET. Ni nur bone eluzu tiun mate-rialon. Cetere, ju pli nia movado evoluigos, des pli da materialo ĝi havigos al nia gazeto. Tro diversa estas la legataro de ET, por ke ĝi estus kontentigata per artikoloj politikaj.

Tamen, mi konsentas, ke ET foje estos enu-iga kaj ke estus bone ĝin pli aktualigi. Sed tio ankaŭ estas ebla per aliaj rimedoj. Guste montras s-o H. ankaŭ la aliajn rimedojn al ni. Li entute parolas pri la politiko internacia, nacia, ekonomia vivo, literaturo, arto kaj pli malsupre pri la scienco.

Jen estas vojo por aktualigi nian semajnan gazeton! Precipe la vivo ekonomia estas temo tro malmulte ĝis nun prilaktata. Komprenu ni fine, ke nur la praktika aplikado de Esper-anto kondukos ĝin al venko. Bedaŭrinde, jam de kelkaj monatoj brilas en la titolo de ET la vortoj

MEM VERKU ARTIKOLOJN, KIAJN VI DEZIRAS LEGI!

„Internacia Komercio“ Ĝis nun mi ne vidis tiun aldonon, ankaŭ mi ne scias, kial ĝi ne aperas.*)

Ke ankaŭ literaturo kaj scienco ludas gravan rolon, tion pruvas la „Revuo“ kaj artikoloj kiel la lastaperinta: „Solve de la hieroglifa mistero“, legita certe de multe da legantoj kun intereso.

Ni do aktualigu ET per la rimedoj laste nomitaj, nepre evitu temojn pri la „internacia politiko“ kaj ne detruu per danĝeraj eksperimentoj la mirindan kreaĵon unikan en la movado, kiu estas ET legata kun same granda intereso de diversnacianoj kiel ankaŭ diverssocianoj, de laboristo, profesoro, oficisto, militisto ktp.

Cu tiu ĉi intereso restus, se ET ĉesus rigardi nepren senpartiecon rilate al politiko? Mi persone dubas pri tio.

J. Prabuĉki, Miloslaw.

*) Rlm. de red. — La prokrastiĝo de la apero de „Int. Komercio“ estis kaŭzita per teknikaj malfacilaĵoj, precipe per la nuntempa malrapida irado de la poŝto, tiel ke nia interkomunikado kun la redaktistoj de „Int. Komercio“ loĝanta en Svislando, daŭris eksterordinare longtempe.

Aktualigi ET.

Bonvolu akcepti kelkajn liniojn. Bonan kuraĝigan artikolon mi legis en ET n-o 124: „Aktualigi nian semajnan gazeton“. Jam delonge mi pensis pri tio kaj atendis, ĉu ŝanĝos nia kara ET sian enhavon, laŭ de mi dezirita temo, sed vane. Mi kiel simpla homo kaj leganto de ET ne riskis esprimi mian deziron, timante riproĉon kaj mokon de pli saĝaj homoj; ĉar mi ne estas ĵurnalisto nek povas skribi longajn artikolojn pri tiu ĉi temo, sed tute konsentas al la aŭtoro de la nomita artikolo.

ET, estante neŭtrala gazeto, tamen povas kaj devas esprimi ĉiujn tutmondajn gravajn internaciajn politikajn demandojn, kiel packonferencojn aŭ traktadojn inter malpacemaj regnoj; krom tio ĝi devas konatigi la legantojn kun sciencaj kaj ekonomiaj novaĵoj. Ankaŭ socia politiko interesas la legantojn. Mi pensas, ke por neŭtrala gazeto ĉiuj internaciaj demandoj, gravaj por la tuta homaro, estas permesitaj. En la sendependa ĵurnalo ĉiu homo, de kia ajn politika partio, povus libere esprimi siajn pensojn, sed ne altrudi ilin. Redaktoro devas varbi korespondistojn en ĉiuj gravaj urboj, tiujn li jam trovos.

T. O., Tallinn.

Bedaŭrinda ET!

Dekpaĝa vi devus esti, se vi volus plenumi ĉiujn dezirojn pri via enhavo. Kaj de ĉi tiuj dek paĝoj ĉiu leganto legus eble nur trionon — laŭ sia persona ŝatemo kaj inklino. Kian ĉion oni postulas de vi; per kiom da specialaj deziroj, proponoj, plendoj kaj riproĉetoj oni superŝutas vi! Jen al unu leganto ne estas sufiĉe ampleksa la literatura parto, kiun alia eble tute malŝatas; jen unu deziras legi pri sporto, alia pri filatelo, unu pri internaciaj organizaĵoj, alia pri tekniko, komercio, sciencoj, unu pri politiko, ekonomio, alia pri pacifismo, religio kaj mi — mi ne scias kiaj aliaj — ikoi, ismoj kaj loj; jen unu deziras plej vaste informi sin pri la okazintaĵoj en Esperantujo, dum alia rezonas, ĉar tio tute ne interesas lin. Mi admiras vian paciencon kaj vian persiston, kiel mi jam diris — por kontentigi ĉiun ajn el via legantaro, vi devus esti eĉ pli ol dekpaĝa aŭ aperi 3—4 foliojn en la semajno aŭ kunhavi 3—4 kromajn aldonajojn. Sed eĉ tiam vi ne sukcesus silentigi la rezonemulojn; ĉiam ekzistus grumblando, al kiuj vi ne tute plaĉus, al kiuj vi estus eble tro ampleksa, ĉar —

kiom da kapoj, tiom da ĉapoj.

Sed mi turnu min al la artikolo en via n-o 124: **Aktualigi nian semajnan gazeton.**

Duonleginte la artikolon, mia unu okulo strikta kaj forŝteliris al la finlinio, por tie serĉi vian kutiman: „Rimarkigo de l' red.: Volonte ni publikigos tiajn artikolojn kaj esperas, ke post kelka tempo ktp.“

Sed mi ne trovis ion similan. Ĉu via redaktoro perdis la kuraĝon, aŭ ĉu la ĉiamaj rezonoj konfuzis lian kapon, tiel ke li entute ne plu scias, kion aperi kaj iun tagon surprizos nin per „Esperanto Triumfonta“ enhavanta germanlingve la plej aktualajn novaĵojn kaj plaŭdajojn el Horrem apud Köln, dum la abonintoj de l' „Vespera ĵurnalo por Horrem kaj ĉirkaŭaĵo(“*) vane cerbumegas pri la teruraj, nekompreneblaj vortimonoj en sia ŝatata gazeto.

Sed mi lasu ŝercojn. La menciita artikolo estis al mi tre simpatia, kvankam ĝiaj postuloj ŝajnas al mi lomete tro pretendemaj. Mi opinias, ke pri certaj aferoj, precipe politikaj, mi ĝenerale pli facile kaj pli rapide povas informi min per naciaj gazetoj. La „fakto pri la lasta hungara reĝo, Karlo de Habsburg“ estas certe nur escepto. Ni devas pripensi, ke ET aperas nur semajne: pro

*) Krom ET la eldonejo eldonas germanlingvan ĵurnaleton.

tio tiaj artikoloj eble ne plu estos aktualaj, ĝis kiam ET venas en niajn manojn, aŭ la aferoj estos jam forpuŝitaj de aliaj, pli novaj okazintaĵoj. Krom tio ekzistas la danĝero, ke rilate al pure politikaj okazintaĵoj kaj aferoj estus prezentataj al ni artikoloj, kolorigitaj laŭ nacia aŭ partia vidpunkto de l' raportanto. Ankaŭ la Esperantisto estas pli-malpli naciema kaj ne povas agi kontraŭ sian naturon kaj inklinojn. Nu opinias ja la verkinto, ke la „Esperantista publicistiko estus kontrolo de la nacia“, kiu egaligus „la partiecon de la naciaj gazetoj“; sed mi priitimas, ke el tio rezultus senĉesa diskuto en ET. Proponu, ekzemple, al la legantoj la „kaŭzojn de la nova Orienta milito“ aŭ artikolon pri la rajto de l' Ruhrokupado, kaj supozeble vi tuj estos superŝutata per korektoj, kontraŭdiroj, kiujn vi — se vi volas esti neŭtrala — nepre devus aperigi, kaj kiuj estus sekvataj per opinioj de tria flanko.

Aliflanke mi ne neas, ke estus certa allogo en la provo ekscii kaj sciigi pri politikaj okazintaĵoj ne nur per naciaj gazetoj, sed ankaŭ per organo, kiu senpartie pritraktas la aferojn. Certe ŝatinda estas la propono, per ET servi al la vereco, klopodi, ke la vera bildo pri kelkaj aferoj konatiĝu en la mondo. Sed tiuokaze ni devus limigi nin je nepre laŭvera, eĉ senkritika **sola raporto**. La legantoj devus havi la konvinkon, ke la okazintaĵoj estus „rigarditaj per supernaciaj okuloj kaj priskribitaj en supernacia senco“. Tio ne estos facila, ĉar la raportanto estos en la plej oftaj kazoj ano de la interesita nacio kaj kiel tia li estos pli-malpli partia, kaj eĉ la nelanda neŭtralaŭlo havas pli-malpli da simpatioj por ĉi tiu aŭ tiu lando.

Pri la pritraktado de aliaj temoj en ET mi harmonias kun la verkinto de l' menciita artikolo, ekzemple „pri intervjuo de s-o Lloyd George pri vivantaj politikaj, ekonomiaj demandoj“, temoj kiel: „Kiel oni povus regajni por la tutmonda ekonomia vivo la energion de Ruslando?“ Krom tio oni ŝatus legi pri literaturo, pri artaj kaj sciencaj problemoj, pri diversaj internaciaj organizaĵoj kaj movadoj, pri sporto ktp., precipe pri temoj, kiujn oni ĝenerale ne legas en naciaj gazetoj, artikoloj, kiuj estas tradukindaj por niaj naciaj gazetoj. Ekz. en n-o 124 de ET tre interesis min la artikoloj: „La manko de militismo en la Skolta movado“, „Solve de la hieroglifa mistero“, „Internacia Ekspozicio pri militvunditoj kaj militblindigitaj“, „La lokomobilista bando“.

Sed nun la Esperantaj aferoj!

Estas vere, ankaŭ min ne tre interesas la nomoj de nove fonditaj Esp. grupoj kaj ties prezidanto, la nombro de l' kursanoj, la aranĝitaj festoj kaj ekskursoj. Sed tamen, entute mi ne volas rezigni je tiaj sciigoj. Mi ŝatus scii, kiel statas nia afero en la diversaj landoj kaj distriktoj, scii, kio okazas en Esperantujo, ĉu Esperanto prosperas, progresas; same lingvaj aferoj estas laŭ mia opinio pritraktindaj. Cu ne estas la unua celo — kvankam ne la ununura: Pri Esperanto kaj por Esperanto? Ŝajnas, ke pro tio aktualigis la demando pri la karaktero de ET. Certe estas bedaŭrinda, ke ĝi estu nia centra, boninforma, valora, ĉiam aktuala organo en ĉiu ajn rilato.

Sed el tio rezultas dua, ne malpli grava demando:

Kiel ET efektivigu ĉi-ĉiujn dezirojn? Ĉu la semajna apero, la spaco de tri paĝoj kaj la aldonajoj sufiĉas? La plej bona solvo eble estos jena:

La legantoj, kiuj havas intereson pri la perfekt-eco kaj aktualeco de sia gazeto, mem kunhelpu per stimuloj al novaj abonol por ebligi al ET pli grandan disponeblon; mi estas certa, ke ĝi laŭpove faros sian devon.

Estas necese, ke multaj legantoj pri tio esprimu sian opinion, por ke ni tute klare vidu. La demando estas: Kion deziras legi la abonintoj kaj ĝia kia grado ET povas kaj volas plenumi niajn dezirojn.

Mallerta.

Pri aktualigo.

Vi demandas skribaĵojn de kunopiniantoj? Jen estas unu de ankoraŭ nova Esperantistino! Ne tre multajn ET-ojn mi legis, sed jam sufiĉajn por iomete juĝi pri la enhavo de la gazeto, kiu tute ne povas interesi min. Vi povas kompreni, kiel granda estis mia ĝojo, hieraŭ vespere legante la artikolon de bona Esperantisto, esprimanta ĉiujn ajn pensojn pri la aktualigo de nia gazeto.

Kiam vi iam serĉus iun, kiu povus rakonti ion pri okazintaĵoj en mia kara malgranda Nederlando, mi estus via fidele kunlaborantino, kaj ni Haarlem'aj Esperantistoj farus ĉion por sendi al vi kiel eble plej bonan artikolon.

H. van der Meulen, Haarlem.

Pri la artikolo de s-o Hevesi.

Mi kun interese legis la „iom akran“ artikolon: „Aktualigi nian semajnan gazeton“. Mi tute pensis same jam de longe. Kiam mi lernis ankoraŭ Esperanton, mi ĝojis jam antaŭe, ke baldaŭ mi povos legi plej interesan internacian gazeton. Sed mi tute estis surprizita kiam mi legis ĉiam artikolojn por- kaj pri-Esperantajn anstataŭ trovi internacian publicistikan literaturon per Esperanto. La ideo de s-o Endre Hevesi estas vere bona: oni devas eduki Esperantistajn ĵurnalistojn. Mi mem tre volonte kunhelpus.

Cetere la artikolo: „Solve de la hieroglifa mistero“, estas bona komenco sub rubriko „Scienco“. Se la ĉefartikolo de ET estus ĉiam politika, socia aŭ arta aktualajo, kaj se sub „Scienco“ aperus ĉiam same interesa artikolo, ET havus tute certe tre baldaŭ 5000 da abonantoj, kaj mi mem tuj fariĝus dumviva abonanto.

Kun koraj salutoj mi restas

Josef Roman Scherer,
Kriens apud Luzern, Svislando.

Dezirata enhavo de ET.

Ĉiujn interesas poŝtaj aferoj, afrankad-tarifoj en diversaj landoj. Pro la kurza diferenco kaj manko de transpagila banko nepre necese estas scii la kostojn de respond-kuponoj por profiti, aĉetante ilin en la lando plej favora al la aĉetantoj.

Ĉio pri internaciaj kongresoj, ilia loko kaj dato. Tiujn sciigojn oni povas uzi ĉu por vizito kaj parola propagando de nia lingvo inter diversnacianoj, ĉu por alsendo de salutleteroj, kaj -telegramoj, aŭ por alsendo de propagand-materialo. (La kreado de „Novaj Tempoj“ ja montras la necesecon de propagando dum internaciaj kunvenoj kaj kongresoj.)

Entute sciigoj, kiujn oni povus traduki kaj sendi al naciaj gazetoj kaj revuoj; sciigoj eĉ ne rilatantaj al Esperanto kaj nia movado, sed interesaj novaĵoj kaj lasttempaj eltrovaĵoj.

Mallongaj Esp. Sciigoj estu etigitaj.

... Mi tre konsentas la postulon, ke naciaj folietoj malaperu, kaj tute ne povas kompreni, kial naciaj eldonejoj de lernolibroj kaj vortaroj ne anoncas pri tiuj eldonoj en naciaj gazetoj.

H. Janverk, Vazalemo, Estonio.

ET kaj Sporto.

La sportista Esperantistaro tre ĝojos, se vi aperigos almenaŭ dumonate specialan aldonon de ET pri sporto nomota „Sport-Revuo“. Laŭ mi ĉi tia nova eldono antaŭpuŝos Esp. konon en la sportistaj rondoj. Vi facile povus ricevi de la samideanoj artikolojn kaj komunikaĵojn pri gravaj okazintaĵoj en la sportista mondo.

St. Pedrazzini, Locarno.

Praktiko.

Leginte kun intereso kaj simpatio la vortojn de nia samideano Endre Hevesi, en ET n-o 124, pri la aktualigo de nia semajna gazeto, mi ŝatus kontentigi lin, ke almenaŭ inter la skolta Esperantistaro oni jam entreprenis praktikan propagand-laboron por Esperanto.

La Propaganda Faktestro de la Skolta Esperantista Ligo nun ankaŭ estas la Eksterlanda Redaktoro de angla monata gazeto „The Open Road“ kaj por siaj publikigaĵaj informoj el ĉiuj partoj de la mondo li organizis la helpon de la anoj de la S. E. L., kiuj regule sendas raportojn al li pri „The Open Road“ aktivecoj en siaj koncernaj landoj. Tiuj raportoj estas verkitaj en Esperanto, kaj li tradukas ilin en anglan lingvon por publikigo. Li ne kaŝas tiun fakton, sed publike informas la legantaron, ke informojn li akiras per Esperanto.

Estimata Endre Hevesi, mi opinias, ke mian agadon vi aprobas kaj mi tial sugestas ke, leginte miajn vortojn, vi skribu al mi por helpi al mi en mia laboro. Mia gazeto traktas ĉiujn aktivecojn de skoltismo, turismo, atletiko, tendaro ktp., sed mia ĉefa celo, kiel serioza Esperantisto, estas propagandi en ĉi tiu praktika maniero nian karan lingvon.

J. W. Leslie, Eksterlanda Redaktoro.
„The Open Road“, Denison House,
Vauxhall Bridge Road, London, S. W. 1.

Moto: Antaŭen sur la vojo al infana koro.

Ne forgesu la infanaron!

Ni demandu nin, kion ni celas? Certe la jenon: Ĝeneralan akcepton de Esperanto ĉe ĉiuj registaroj kaj per tio enkondukon de la lingvo en ĉiujn lernejojn. Do kiu estas unuavice la celato? La lerneja infanaro! Ĝis nun ni direktis niajn penadojn precipe al la oficistaro. Sed oni scias,

ke la ofica vojo estas tre longa. Oni paŝadas sur ĝi tre malrapide.

Sed ekzistas ankaŭ alia vojo al la celo. Aŭskultu! Ĝi gvidas rekte al la koroj de l' infanoj! Gajnu la simpatiecon de la infanaro por nia afero per infanecaj rimedoj — kaj vi havos ĝian armeon grandamase malantaŭ vi. Kaj tia batalantaro venkos ĉion!

Gajnu la simpatiecon infanaran! Jen nia devo! Mi bone scias, ke jam multo estas farita tiu-direkte. Sed nur tie kaj tie ĉi. Ni agu ĝenerale! Jen:

Donu al la lerneja infanaro gazeton infanan kun enhavo amuza kaj docema. Docema per enkonduko en la lingvon laŭ rakonta, interbabila maniero kaj per raportoj el aliaj kampoj.

La infanoj devas freneze amikiĝi kun la gazeto, kaj per tio Esperanto fariĝos la vera amiko infanara.

Krio post krio! Ho! — Nova gazeto! Mi petas ne ekindigni. Al via pripensado mi proponas la decidon: Ĉu novan gazeton fondi aŭ pliriĉigi ET per aldonoj: „Infana mondo“ (aŭ aliatitole).

Pripensu, vi bonfaruloj je infana koro, vi infan-amikoj ĉiulandaj, ĉu ne necesa estas mia alvoko!

Multaj infanoj lernas Esperanton, sed post fino de la kurso ilia fervoro malestiĝas iom post iom. Mankas amiko, kiu plie ilin kondukas tra Esperantujo. Ĉar ne ĉiuj estas poŝtmark-kolektantoj!

Pripensu: la maljunaj Esperantistoj finvivis, ni bezonas bataleman, vigan post-kreskularon. Semu kaj agu!

Konsentskribojn al

s-o Fritz Riemann
Germanujo, Kassel, Königstor 26 (Gillé)

Rlm. de red. — Ni atentigas pri samtemaj artikoloj en ET 120 kaj 125.

Pri gazeto por infanoj

ni ricevis ankoraŭ informon de „Novaj Tempoj“:

De du monatoj ni serioze studas la demandon. Ni estas edukistoj, do fakistoj pri la infangazeta demando. Ni entreprenis (vidu literaturojn en n-oj januara kaj februara de „Novaj Tempoj“) tradukon de bela infanliteraturo (4 lingvoj).

Samideano Robin de unu monato proponis, ke „Esperantista Junularo“ fariĝu fakte „N. T.“. Ni akceptis. La gazeto estos presata en kaj disendata el Germanio. Ĝi estos ilustrata. Ĝi estos presata dank' al la kompostajo de „N. T.“, kaj ni promesas, ke ĝi enhavos nur bonajn. S-o Robin konservas la redakcion.

Al ĉi-supre publikigitaj artikoloj ni ne donas komenton. Ni nur ripetas, kion ni jam skribis en ET n-o 126:

Ni perfektigu ETan, kiom kaj kiam tio estos ebla; ni konsideru la konsillojn, dezirojn kaj kritikojn, kiom ni opinias tion utila; kaj cetere — ni ne parolu, sed agu!

Tamen estu permesate al ni direkti niaflanke kelkajn konsillojn kaj petojn al niaj legantoj:

1. Ĉiam memoru, kiel malfacile estas la tasko de nia ĉefredaktoro! Klopodu viaparte, laŭeble faciligi ĝin!
2. Mem kunlaboru laŭeble por tiu fako, kiu vin plej multe interesas! Mem verku artikolojn, kiajn vi deziras legi!
3. Verkante, klopodu esti plejeble objektiva, senpartia, neŭtralema!
4. Legante, estu tolerema, se iu esprimu ŝajn-as al vi subjektiva, partia aŭ ne sufiĉe neŭtralema!
5. Manuskriptojn skribu plejeble klare kaj legeble! Lasu sufiĉe da margeno libera por eventualaj korektoj! Manskribante manuskripton, ne skribu „u“ anstataŭ „n“, aŭ „l“ anst. „t“ ktp., precipe en propraj nomoj, sciencaj aŭ teknikaj terminoj! Ĉe mallongigoj apliku la skemon uzatan en ET, por ke la redaktoro ne devu korekti ilin: ekzemple „s-o“ (ne s-ro aŭ s-ro.), „n-o“ (ne n-ro, n-ro. aŭ Nr.) ktp.
6. Raportojn pri aktualajoj verku koncize, fidele kaj sendu rapide!
7. Kuraĝu subskribi ĉion per via vera nomo, anstataŭ per pseŭdonimo! Sincerulo ne timas respondecon.
8. Varbu novajn abonantojn! Havante sufiĉe da enspezoj, ni povos pagi bonajn honorariojn por artikoloj kiuj tiokaze ankaŭ postuli, kion nun ni povas nur peti.

Se vi bonvole kaj akurate plenumos tiujn konsillojn kaj petojn, vi havos baldaŭ ĵurnalon, kiun envios eĉ multaj nacilingvaj gazetoj pro ĝia enhavo. Ni faros, kion ni povos. Vi helpu nin!

Kaj nun: Ne paroli, sed agi!